„Mutig vorwärts!“

Aŭstria Esperantisto

„Kuraĝe antaŭen!“

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Abonprezo (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, por ĉiuj landoj ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sv. fr. 3.75; ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Apéras la 5. de ĉiu monato. Leteradreso: Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

Jaro 9/10 (134/135) Korneuburg ĉe Wien, la 5. de oktobro 1936. 13. jaro

XVIII-Universala Kongreso de Esperanto en Wien 1936.

TELEGRAMO.

28-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, WIEN.

DANKAM NIN TENAS KRUELA LA SORTO,

LA DEVIZO: FIDELA ĜIS MORTO!

VIVU LA 28-a! VIVU NIA IDEO!

TEO JUNG.

Jam antaŭ la 8. venis aro da s-anoj, por rigardi la kongresurbon antaŭ komen-de la kongreso kaj ĝui la belajn ektojn en la muzeoj.

Sed la 8. de aŭg. jam regis vigla o en la kongresejo, por kiu is la unuopaj festsalonegoj de ama imperiestra kastelo. En la a marmora antaŭhalo estis talitaj poŝtoficejo, kie s-ano ora dejoris, krome informejo s-anoj d-roj Engländer kaj fer, disdonado de varbiloj kun dado de kongreslibroj kaj gnoj (s-anino Hojtasch kun antoj) kaj vendejo de kongres-kartoj, kiujn oni tuj povis upigi per la aparta kongres-po ĉe la poŝtoficejo. La antaŭ-ankaŭ servis kiel promenejo babilejo por la kongresanoj, krome havis la belegan Burg-en (iam privata ĝardeno de la eriestra familio) per aparta ejo el la antaŭhalo je sia dispono. n la ne tro granda oficejo la kongreso — alia konvena ne estis je nia dispono — ris prez. Steiner, liaj filoj Hugo kaj d-ro Lothar Steiner, s-aninoj ber kaj Falk. Kiel skribočambro servis Esperanto-Muzeo (la 300 m² granda ejo), kiun en la sama domo oni povis gi simple per lifto. Krome estis tabloj skribi en la antaŭhalo. La agrablajo, ĉiujn aranĝojn en la sama konstruajo aliaj kongresoj oni devis kuri eĉ longe uri al la diversaj aranĝejoj), havis la malagrablajon, ke ne estis je nia ono loko por pli granda oficejo kaj bejo.

kongresajojn la partoprenantoj en Aŭstrio“ ricevis jam en Salzburg kaj la aliaj en la 5 diversaj stacidomoj en Wien, kie ges. fratinoj Mayrleb, s-inoj Hubinger, Raff, Linz, Wenisch, s-roj dir. Menacher, Fellner, Weber, Schäfer, Ammer, Schlerka kaj Hejlik dejoris.

Post alveno de la karavano el Salzburg tuj estis kunsido de UEA-estraro kun LKK por fiksi la tagordon de la inaŭguro.

Antaŭ la 20-a horo estis venintaj la aŭstria **vickanceliero Hermann von Baar-Baarenfels, ministro por komerco Fritz Stockinger, episkopo de malnovkatolika**



Malfermo de 28-a en Festsalonego de Hofburg.
De md. dir. Schamanek-Wien, dir. Goldsmith-London, prez. de UEA generalo Bastien-Paris, prez. de 28-a kort. kons. Steiner, Leo Belmont-Warszawa, prof. d-ro Odo Bujwid-Kraków, E. Malmgren-Stockholm, inĝ. Isbrücker-Haag, P. Mahrus-Fayoum.

eklezio Robert Tüchler, policprezidanto d-ro Michael Skubl, ĝeneralinspektoro de la polico d-ro Manda k. a. Ili kun LKK, **Adam Zamenhof, Bujwid** kaj kelkaj eminentuloj el Esperantujo kolektiĝis en aparta salonego kaj poste je la sonoj de la aŭstria himno eniris la jam plenplenan belegan Festsalonegon en Hofburg, ornamitan en la aŭstriaj koloroj ruĝa-blanka-ruĝa kun la aŭstria ŝtat-emblemo „Kruken“-kruco kaj en superdimensia laŭrokrono orumita Esperanto-stelo. Belega aranĝo de palmoj kaj aliaj kreskajoj ornamis la estradon. En la unua vico iris vickanceliero Baar-Baarenfels kaj ministro Stockinger kaj en la mezo prez. Steiner. (Ministro Stockinger estis dirinta al vickanceliero Baar-Baarenfels „Kortega konsilisto Steiner devas hodiaŭ iri en la mezo, ĉar estas lia honortago“.)

Poste Steiner nome de la Prepara komitato salutas la reprezentanton de la registaro s-ron Vickancelieron Baar-Baarenfels kaj petas lin, inaŭguri la kongreson.

Vickanceliero Baar-Baarenfels alparolas germanlingve:

Mi ĝojas, ke la 28-a Universala Kongreso de Esperanto kunvenis en Wien. Esperanto, elpensita de ĝia elpensinto kiel popolinterliga, kvazaŭ neŭtrala lingvo trovis en Aŭstrio, kiu krom nacia ideo kaj la amo al sia patrujo neniam malatentis la kulturadon de la spiritaj mond- kaj homaraj valoroj, jam de sia plej unua komenco favoran efion. Jam en la Unua Kongreso en Boulogne sur Mer Aŭstrio estis reprezentata kaj depost tiu tempo la Esp.-movado ne nur en la tuta mondo, sed ankaŭ ĉe ni estas farinta ĝojigajn progresojn. La sintenado de Aŭstria Federacia Registaro eble per nenio pli bone estas karakterizata ol per la fakto, ke en nia lando — aligita al Nacia Biblioteko Aŭstria — aparta Esp.-Muzeo estis fondita, al kiu la ĝis nun en Genevo troviĝinta kolekto de Universala Esperanto-Asocio estos envicigata, tiel ke la kolekto de la Muzeo nombros 20.000 librojn.

La lingvo similas al glavo. Oni per ĝi kapablas defendi aŭ detrui. Klopodu ĉiuj, kiuj uzas kaj akcelas Esperanton, peri la ne perdotajn kulturvalorojn de sia hejmolando pere de Esperanto al ĉiuj siaj kunuloj kaj kulturi pensojn de homa grandeco kaj pureco kiel ĉiaman trezoron kaj ilin heredigi; tiam ĉi tiu de unuopa homo elpensita lingvo servos laŭ la ideo de sia elpensinto al la tuta homaro kaj havos certe la subtenon kaj favorigon de ĉiu bonvola homo.

En ĉi tiu senco mi salutas vin en Aŭstrio. (Finante en Esperanto): Mi bonvenigas vin en Aŭstrio kaj deklaras la kongreson malfermita!

Protokolanto **Werner** tradukas la paroladon en Esperanton.

Prez. Steiner dankas la vickancelieron kaj pere de li al la granda favoro de la Aŭstria Registaro. Sekvas la elekto laŭ listo, legita de UEA-direktoro **Goldsmith**: Prez.: **Kortega kons. Steiner**, prez. de Aŭstria E.-Asocio kaj Intern. Esp.-Muzeo; viceprez.: **sekcia ĉefo d-ro F. Uebelhör, direktoro Schamanek, univ. prof. d-ro Odo Bujwid ,d-ro Kempeneers, mag. Höfert, prof. Waringhien**; ĝen. sekr.: **Goldsmith**, sekr.: **Ernst Werner** kaj **Karl Haager.**

La elekto okazis per aklamo.

Prez. **Steiner** dankas pro la elekto kaj citas leteron de la kabineta ĉefo de la Ŝtatprezidanto, per kiu **Prezidanto s-ro Wilhelm Miklas**, nia alta protektoro, petas senkulpigon pro foresto el Wien kaj petas, ke la kongresprezidanto salutu nome de la Ŝtatprezidanto ĉiujn kongresanojn. Ankaŭ **kanceliero d-ro von Schuschnigg** ne estas en Wien, petas pardonon, ke li ne povis ĉeesti kaj delegis s-ron vickancelieron reprezenti lin kaj la registaron. Li deziras al la kongreso la plej bonan sukceson. „Speciale mi salutas la ministron por Komerco kaj Trafiko s-ron **Fritz Stockinger:** gravan favoranton kaj grandan amikon al Esp. Li ĉiam helpis, lastatempe al la **eldonigo de la oficialaj ilustritaj poŝtkartoj kun tekstoj germana, angla, franca kaj Esperanta** (50 diversaj kartoj), al la ricevo de la **grandioza nova salonego por Intern. Esp.-Muzeo** kaj al la **belegaj salonegoj en Hofburg** por nia mondfesto.“ Poste la prez. salutas la reprezentantojn de la div. ministerioj kaj de la alilandaj registaroj, la episkopon Robert Tüchler, reprezentanton de Urbo Wien, policprezidanton d-ron Skubl, ĝeneralinspek. de polico d-ron Manda kaj multajn aliajn. Fine li salutas ĉiujn kongresanojn kaj deziras al ili agrablan restadon en la kongresurbo. Li atentigas, ke la grava tagĵurnalo **Reichspost** dum la kongres-semajno disponigas al ni **ĉiutage tutan paĝon en Esperanto.**

Sekvas alparoladoj de la reprezentantoj de jenaj **registaroj: greka:** leg. sekr. inĝ. Gianellia; **nederlanda:** inĝ. Isbrücker; **hungara:** eksministro d-ro Benard; **brazila:** leg. kons. d-ro Carlos Ramos kaj **usona:** s-ro Hamann.

Nome de la **Urbo Wien** supera senata kons. **d-ro Horneck** alparolas: „La internacia kulturado de Esp. estas ĝojiga signifo de idealismo. Vi estimataj festgastoj reprezentas popolon de idealistoj tra la tuta mondo. La idealismo ĉiam trovis rekonon en nia lando. La politika signifo de Aŭstrio kiel ponto inter nordo kaj sudo, oriento kaj okcidento ne plu estas problemo, ĉiuj ŝtatoj jam rekonas tiun ĉi historie-geografian signifon de Aŭstrio, kiu dum la monarkio per ligo de diversaj nacioj en unu regno kondukis la popolojn al la nuna alteco de kulturo. En la nomo de la urbestro **Richard Schmitz** mi deziras al via kongreso plej bonan sukceson kaj al ĉiuj de malproksime venintaj kongresanoj, ke krom la kongreslaboroj en nia bela Wien vi sentu vin plej bone!“

Telegramoj senditaj:

„Ekscelenco Federacia Prezidanto
Wilhelm Miklas
Velden am Wörther See.

Al la alta protektoro de 28-a Universala Kongreso de Esperanto sendas siajn respektplenajn salutojn.

Generalo Bastien,
Kortega Konsilisto Steiner.“

„Ekscelenco Federacia Kanceliero
von Schuschnigg
St. Gilgen.

Al la honora prezidanto de 28-a Universala Kongreso de Esperanto sendas siajn respektplenajn salutojn.

Generalo Bastien,
Kortega Konsilisto Steiner.“

Prezidanta
Oficejo. 13. de aŭgusto 1936.
10.729

Al prezidantaro de 28-a Esperanto-Mondkongreso
Wien.

Sinjoro la Federacia Prezidanto ricevis la saluttelegramon de la prezidantaro de 28-a Esperanto-Kongreso en Wien. Li tre ĝojis pri la ĝentilaĵo, kiun li vidas en ĉi tiu al li direktita manifestado, kaj kompleze dankigas.

La direktoro de Prezidanta Oficejo:
D-ro Huber.

Prez. **Steiner** tradukis la vortojn de urba reprezentanto E.-lingven kaj aldonis „Vere ni estas idealistoj kaj ni ĝoju pro tio, ĉar ĉi tiu idealismo kapabligas nin esti bonaj realistoj en la efektivigo de niaj celadoj!“

Post tio **Ludwik Zamenhof**, la nepo de nia majstro, kune kun prof. **d-ro Bujwid**, kunstudinto kun Zamenhof, alportas la **historian flagon** de **Unua Kongreso en Boulogne sur Mer 1905** kun la subskribo de Zamenhof, donaco de ges. Sergeant de Boulogne al Int. E.-Muzeo, dume la orkestro de la polico ludis la Esperanto-himnon, kiun ĉiuj starante kunkantas.

Prez. de UEA **general-intendanto Lou Bastien:** „Unue mi dankas nome de ĉiuj esperantistoj al ĉiuj oficialaj aŭtoritatoj, kiuj bonvolis helpi al la aranĝo de ĉi tiu kongreso kaj dankas ankaŭ al tiuj, kiuj preparis la kongreson. — Ni kunvenas en malfavora epoko, meze de konfuza mondo. Post la milito la popoloj iras al celo, kiujn ili mem ne konas. La popoloj estas en malekvilibro. La plej grava estas la malekvilibro de la spirito. La mondo serĉas novan ekvilibron. Sed la interesoj de la diversaj popoloj estas tiel interplektitaj, ke la plej bonaj klopodoj restas senfruktaj. Ni ĉiuj dependas unuj de la aliaj. Nur per nova ordigo de la rilatoj inter la popoloj la mondo povos ekvilibriĝi. Necesas tutmonda opinio. Sed por ke la revo efektiviĝu estas necese, ke la popoloj ne estu apartigitaj. Neniam nia tasko aspektis pliĝustatempe ol nun. Ni ne celas al paco de kontraktoj kun kaŝitaj pensoj, sed al vera, sincera paco de ĉiuj popoloj. Ni ja ne preterlasu en nia movado la potencajn helpilojn de komerco ktp. Sed ni laboru plej efike koraŭ por nia idealo. Grandega estas nia tasko en la nuna momento. La tutan publikon ni devas atentigi. Ne forgesante la noblajn pensojn ni laboru ankaŭ praktikajn taskojn. Ni havas por tio ligilon inter la landaj asocioj en UEA: Ni uzu ĝin! Kaj ni estu optimistaj, ĉar pesimismo haltigas la agadon. Do ni ne forgesu, ke nia agado estas necesa por la mondo. Ĉiam antaŭen! Esperantismo daŭru kaj daŭru ĝis la fina venko!“

Kongresprez. **Steiner** dankas al ges-Bastien pro liaj kuraĝigaj vortoj: „Jes ni estas optimistoj kaj en tiu ĉi senco ni venkos!“ Tiam li memorigas pri la mo-

Post la katolika diservo. antaŭ Votiv-preĝejo.
Meze kardinalo ĉefepiskopo de Wien d-ro Theodor Innitzer, d. de li sekcia ĉefo d-ro Uebelhör, ministro Fritz Stockinger, univ. prof. d-ro Bujwid; md. prez. Steiner, P. Rotondo, P. Carolfi.

Akcepto en la festsalonego de Urbdomo:
De maldekstre: Senata ĉefkonsilisto d-ro Maty, reprezentanto de la urbestron, poeto Leo Belmont, prezidanto generalo Bastien, Wanda Zamenhof, Ludwik Zamenhof, prof. d-ro Bujwid, kortega kons. Steiner kaj multaj ges-anoj en naciaj kostumoj.

inta direktoro de UEA, la ĉiama ĝenerala ekretario de niaj kongresoj, **s-ro Robert** Kreuz. (La kongresanoj ekstaras.) Poste li onigas la ceteran programon de la vespero aj de la sekvanta dimanĉo.

Sekvas alparoladoj de la **reprezentantoj** e la Landaj **Asocioj** por Belgujo: **d-ro** Kempeneers, Britujo: **Olliver,** Bulgarujo: Kotov, Ĉeĥoslovakio: **prof. d-ro Kamaryt,** Germana Ligo en ČSR.: **Gahler,** Danujo: Langgaard, Egiptujo: **Mahrous,** Estonujo: Kapper (en poeta formo), Francujo: **prof.** Varinghien, Hungarujo: **prof. de Mihalik,** talujo: prof. **Facchi,** Japanujo: **Ikegaua,** ugoslavio: **Golobiĉ,** Novzelando: **Horn**low (ankaŭ nome de la registaro!), Polujo: rof. d-ro **Bujwid,** Rumanujo: **Harabagiu,** vedujo: estrarano **Malmgren,** Svisujo: -ro Spielmann, Turkujo: **d-ro Ardabeze,** rgentinio: **s-ino Hoŝtalek,** USA: **Scherer,** derlando: **Benink.**

Kiel lasta legas la festparoladon **Leo** lmont, kunstudinto kun Zamenhof. La roladon ni publikigos.

Je 22 h 20 prez. Steiner fermas la festkunenon.

La kongresanoj iras malsupren al la belega eldenplatz antaŭ la kongresejo, por rigardi e tie la je honoro de la kongreso **fee ilumitan gotikstilan Urbdomon.**

Poste en la kongresejo **Interkonatiĝa Ves**ero. Oni povis sidi tie ĉe tabloj kaj manĝi, i povis promeni en la grandaj salonegoj, ri novajn interkonatiĝojn, renkonti malnovajn natojn kaj trinki aŭ manĝi ion ĉe la bufedoj. is meznokto la ges-anoj kunrestis.

9. de **septembro:**

Diservoj.

„Nia **Gazeto**"-Nice raportas: „Matene kazis la kutimaj diservoj. La katolika estas parte menciinda, ĉar ĝi konsistis en Votivreĝejo el pontifika meso, kiun celebris la episkopo de Vieno, kardinalo Innitzer, speciale reveninta de sia somera restadejo. Longe antaŭ la fiksita horo multnombraj esp-istoj plenigis la preĝejon. Suprenirinte la katedron R. P. Carolfi per forta voĉo faris en E. elokventan predikon „kiu estis kristana formo de la interna ideo". Dum la pontifika meso, kiu sekvis, la polica orkestro aŭdigis la meson de Schubert kaj de tempo al tempo granda Esp.-standardo donis sian verdan silkon sammomente kiam ĝiniĝis la kapoj de la ĉeestantoj. En la tre katolika Aŭstrujo la potenca apogo, donita publike kaj pompe de la plej alta eklezia aŭtoritatulo de la lando al nia afero, certe havos tre bonan efikon. Ni do ŝuldas aparan dankon al kardinalo d-ro Innitzer. Tuj post la eliro okazis fotografado de la ĉeestantaro, ĉirkaŭanta la kardinalon, kiu, kiam la fotografisto plenumis sian devon, foriris aŭtomobile. Tiam ni ĉiuj formis batalionon, imponan sed pacan, malantaŭ la verda standardo kaj laŭtakte marŝante sekvis la polican muzikistaron, kiu ludis plenblove la plej marŝigajn ariojn. Tiel ni alvenis al la tombo de la nekonata soldato. Ĉar ĝin generalo Bastien kuŝigis grandan kverdan kronon en la nomo de UEA kaj kore parolis kontraŭ la milito kaj la militemo. Pauvrehomme.

Kompletigo el **Esperanto Triumfonta:**

Ĉe la tombo de la nekonata soldato generalo Bastien eldiris jenajn parolojn: „Al la nekonataj soldatoj ni metas florkronon. Ili mortis por via patrujo kaj nun estas kunigitaj kun la mortintoj de aliaj landoj. Ĉar nia idealo ne plu estu milito. Ni ĉiuj laboru por ĉi tiu celo kaj tio estu la plej grava rekono por via viktimo." Estis solena momento, kiam franca generalo diris tiujn vortojn ĉe la tombo de soldato el antaŭa malamika lando. Baur.

Ni devas aldoni:

Aro da eklezianoj diversnaciaj atendis la kardinalon antaŭ la preĝejo kaj kondukis lin en la preĝejon.

La diservon ĉeestis ankaŭ **ministro Stockinger,** kiu pro tio restis en Wien, reprezentanto de **vickanceliero Baar,** devinta forveturi al Salzburg akcepti la italan kronprincon, ministeria konsil. d-ro Mayr kaj aro da aliaj eminentuloj.

En la kripto de la „nekonata soldato" generalo Bastien kun kort. kons. Steiner metis florkronon. Elirinte la polica orkestro ludis la aŭstrian kaj Esperanto-himnon.

Generalo Bastien dankis al la orkestro.

Generalo Bastien kaj kortega kons. Steiner metas florkronon sur la tombon de la herooj.

La aliaj diservoj:

Je la 8 h en **protestanta preĝejo** en Dorotheergasse.

„Esperanto Triumfonta" raportas: „Protestantan diservon celebris pastro M. a. van Pernis el Nederlando. Samtempe okazis laŭ la programo israelida diservo."

Kompletigo: La **israelida diservo** je la 9 h okazis en ĉeesto de **familio Zamenhof** en la granda templo en Seitenstettengasse kun granda programo.

Ligo de Judaj Frontbatalintoj sendis 20-membran honor-delegitaron en uniformo kun la militaj distingoj.

Rabeno **d-ro Murmelstein** faris bonegan E.-predikon kaj **prof. Kamaryt** dankis nome de UEA.

Je la 11 h diservo en **malnovkatolika preĝejo,** kie la **episkopo** por la aŭstria teritorio **Robert Tüchler,** nia samideano, faris Esp.-lingvan predikon antaŭ granda publiko.

Ekskurso:

Post la tagmanĝo en 16 aŭtobusoj tra la fama komercstrato Mariahilferstraße preter la Teknikan Muzeon al la plezurkastelo de la imperiestrino Maria Theresia kaj ĉiama restadejo de imperiestro Franz Josef. Tie oni vizitis la salonegaron de la kastelo, eble unika en la mondo, ĝuis la belegan parkon kun la ĉarma elrigardejo Tivoli en la fono kaj rigardis la bestĝardenon.

Je la 18 h reveturo al komuna vespermanĝo en Hotel Münchnerhof sur Mariahilferstraße kaj poste al la teatraĵo en Raimundteatro.

„La Blanka Ceval'."

Laŭ Esperanto Triumfonta: „Sukceso ĝi estis, fakte grandega sukceso. La plej bela aranĝo de la tuta kongreso. Ni gratulu la kongresan komitaton pro ĝia elekto kaj la aktorojn pro ĝia lertega efektivigo. Entuziasmo regis en la teatro, ne unu homo forkuris post la unua akto, sed ili ĉiuj estus restintaj ĝis meznokto, se la prezentado ankoraŭ estus daŭrinta pli longe.

Estis ludata la Blanka Ĉevalet'. Ĉu mi bezonas rakonti pri la enhavo? Ne, certe ne, ĝi jam estas tiel konata en la tuta mondo, ni ĉiuj jam vidis ĝin sur scenejo aŭ en filmo, ni kantas kaj fajfas la melodiojn ĉarmegajn parkere. Sed nova estis ĝia prezentado en Esp. kaj plej ĝojige estas, ke ĝi neniel perdis en tiu lingvo sed eĉ fariĝis pli bela kaj ensorĉiga per ties belsoneco. ... La aktoroj ludis bonege. Kun surprizo mi poste aŭdis, ke ili ne estas esp-istoj; mi estus vetinta, ke ili estas. Ili pli bone prononcis ol multaj malnovaj esp-istoj. Je la fino de la prezentado la aplaŭdo ne emis ĉesi kaj krom la aktoroj kongresa prezidanto Steiner kaj la teatra direktoro Leo Kraus devis aperi sur la scenejo por akcepti la aplaŭdon de la entuziasmita publiko."

Gravan aferon forgesis s-ano Baur: Sur la scenejo aperis la tradukintoj **Hovorka** kaj **Norbert,** kiuj unuavice per sia bonega traduko ebligis la grandan sukceson de la teatraĵo!

Multdisvastigita Viena tagjurnalo **Volks-Zeitung** skribas: (Trad.) „Jam milfoje Blanka Ĉevalet' faris sian devon, venigi vizitantojn en la teatron. Sed kiu eĉ parkere scias la teatraĵon, tamen ĝojis pri la prezentado en Esperanto okaze de la Esperanto-Mondkongreso. Kvankam Raimundteatro kutime havas plenvizitatajn prezentadojn, ĝi tamen neniam havis pli bone vizititan teatron kaj kun tiom bona kaj aplaŭdema publiko.

Sed kune kun la gaja tekstlibro kaj la popularaj melodioj de Ralph Benatzky ankaŭ Esperanto havis rajtigitan sukceson. Oni spertis, ke ĉi tiu lingvo estas bone kantebla. Se ankaŭ en la unua momento iomte estis fremde aŭdi, ke

„En Salzkammergut
Ja laŭ bezon' estas ĝoj'
Ĉe la dancmuzik' Holdrio!"

oni baldaŭ alkutimiĝis. Oni komprenis preskaŭ ĉiun vorton. Ni ne volas esplori, ĉu Esp. por la germano vere estas tiel facile lernebla aŭ ĉu oni jam scias jam parkere ĉiun vorton el Blanka Ĉevalet'. Certe Esp. transprenis multajn vortojn el la germana lingvo kaj ankaŭ la aliajn vortojn komprenas kiu scipovas romanan lingvon. Tiel ankaŭ la Vienanoj kunkantis la efikajn kantojn en Esperanto.

Specialan laŭdon meritas la geaktoroj, kiuj por ĉi tiu prezentado estis lernintaj siajn rolojn en Esp. kaj faris ĝojan surprizon al la gastoj. Anni Sieburg estis ĉarma mastrino, Ernst Duschy gaja ĉefkelnero

Artikolo **„Olimpiaj Ludoj" en n-ro 11.**



La aktoraro en „Blanka Ĉeval' ".

Sidantaj de md: Heinrich Gassner, Hedy Straas, kort. kons. Steiner (prez. de LKK.), Annie Sieburg, Anny Krenek, Ernst Duschy, Mia Kainz, Marcel Benard.

Starantaj: Komponisto Leo Kraus, Paul Arndt. Franz Rainer, Emma Raff, Thomas Peter, Ernst Rollé, Bruno Zilzer, Richard Köhler, Robert Pless, Paul Gerhard, Karl Marfeld.

Leopold, kies Esperanto preskaŭ sonis laŭ Viena dialekto dume Marcel Bernard-paroligis sian Giesecke en Esperanto-Berlinana idiomo. Esperanto tamen estas tiel gracia lingvo, ke ĝi kapablas koloriĝon laŭplaĉan. Ĉe ĉi tiu unua Esperanto-prezentado de Blanka Ĉevalet' aŭdiĝis aplaŭdostormoj kiel ĉe la vera unua prezentado en germana lingvo."

Leopold al Josepha:

„Iam nur, ho unufoje nur
Permesu, ke mi manifestas
— Kion gardas — mia kor-album'
Skribite per diskreta plum'.
Mirinda estas via am'
Ĉesigu la doloron!
Turmentas per pasia flam'
Sopiro mian koron.
Nur iomete da espero
Donacu! Kaj la tero
Estiĝos tuj paradiz',
Se la am' estas la deviz'!"

Josepha:

„Ĉesu nun, parolu ne al mi
Pri am-revetoj kaj sekretoj,
Ĉef-kelner' nur estas vi sinjor'
Kaj ne la kavalir' de l' kor'!"

Bonega estis Robert Pless kiel advokato d-ro Siedler en sia duobla rolo kiel ŝajna amanto de la mastrino kaj vera de Ottilie, ĉarme prezentita de Lotte Berg.

En Wolfgang apud la lagobord'
Atendas feliĉ ĉe la pord'
Kaj vokas: „Bonan matenon!"
Eniru, forgesu ĉagrenon
Kaj se devo iun tiras for
Hezitas longe la kor'
Ĉar en Blank-Ĉeval' ĝi travivis
Feliĉon ja dum ĉiu hor'.

Giesecke (en Salzburg-a kostumo): Ĉarme mi aspektas! Se mi tiel marŝus en Berlino sur Leipziga Strato, la homoj kredus, ke mi saltis el ia maskobalo. Kaj ĝi estu eleganta? Nur la duono de la pantalonoj, kvazaŭ la ŝtofo ne estus sufiĉanta, kaj la trikitajn manumojn super la piedoj, kaj la nudaj genuoj? Kiam la suno foriras, oni frostiĝas, kaj kiam ĝi venas, ankaŭ venas la muŝoj kaj kuloj por matenmanĝi. Ĉi-afero marŝas!"

Ĉu vi forgesos la elegante kantintan Sigismondon de Heinrich Gassner en la sceno kun Klärchen, kiun tiel bone prezentis Hedy Straas?

Ĉu Sigismondo kulpas,
Ke li tiom plaĉas?
Ĉu Sigismondo kulpas
Pri sia belec'?
La homoj lin envias
Kaj la homoj klaĉas:
Estu kontentaj,
Ke ekzistas tia spec'!

Certe vi neniam forgesos la ĉarman, petolan Piccolo! Estis la gracia Anny Krenek, kiu gajnis la duan premion en la konkurso pri beleco dum la internacia balo! Multaj diris, ke ŝi meritis la unuan!

La imperiestro estis bonege prezentita de Paul Gerhardt, certe pli bone ol en la samnoma filmo. La leterpordistino Mia Kainz, kiu de komenco ludis sian rolon (pli ol 1000-foje jam) eksonigis siajn jodlojn je la plezuro de la aŭskultantoj. Krome Gustl Zaruba, fama step-dancisto sur piedfingroj, montris sian arton. Ankaŭ la aliaj kunaktoroj faris sian plej bonon.

La muzikan gvidadon faris muzikestro Bruno Zilzer, la dancan Thomas Peter je plena sukceso.

Certe al ĉiuj plaĉis la ofta ŝanĝo de la kostumoj, la bela enscenado, pri kiuj kulpas Ernst Rollé, kiu krome bonege prezentis la ŝpareman profesoron Hinzelmann.

La plej grandan laboron faris teatro-direktoro kaj komponisto Leo Kraus kun la administra gvidanto Karl Marfeld-Neumann. Ili devis elekti inter multaj aktoroj la plej kapablajn — ili vere sukcesis ankaŭ en tio — devis en multegaj provprezentadoj zorgi pri bona prezentado, devis prizorgi la belan teatron, kelkcent kostumojn por la pli ol 100-persona aktoraro kaj krome zorgi pri multaj aliaj aferoj, pri kiuj la publiko ne havas eĉ imagon. Al ili nia plej kora danko!

Preskaŭ ni estus forgesintaj personon, kies nomo ne aperas sur la teatroprogramo kaj kiu estas la animo de bona prezentado: la sufloron. Kun granda pacienco la sufloro devas suflori ĉe ĉiuj prov-prezentadoj jam dekomence, korekti la elparoladon ktp. Kun vera idelismo nia malnova s-anino Emma Raff ludis ĉi tiun rolon kaj ni ĉiuj danku al ŝi!

Al la s-anoj Hovorka kaj Norbert, kiuj tiel bone tradukis la vere ne facilan tekston, jam dankis la kongresanaro per ne finiĝema aplaŭdo sur la scenejo post la prezentado. Estu permesate ankaŭ al la Prepara Komitato de la Kongreso danki al ili plej kore kaj gratuli ilin!

Informilo: „...la kulminacia sceno estis la alveno de la imperiestro. Kiam la grupoj de St. Wolfgang, Mondsee, Gmunden, Linz kaj aliaj envenis, ili estis multe aplaŭdataj. Post la fino de la prezentado la aktoroj ricevis florojn. Anoj de 35 nacio aŭdis en unu lingvo ‚Blankan ĉevaleton', li forgesis dum kelkaj horoj siajn zorgojn."

10. de aŭgusto:

Somera Universitato.

Dank al bone elektita larĝa temo „Kulturaj kaj ekonomiaj problemoj de Eŭropo" la nunjaraj prelegoj de XI. S. U. estis treege vizititaj kaj diligente aŭskultitaj.

La inaŭguro okazis sub la prezido de **prof. Odo Bujwid,** em. prof. de higieno kaj bakteriologio en Krakova Jagelona Universitato.

La serion de raportoj komencis:

Inĝ. Isbrücker-Haag, sendito de **Nederlanda Registaro,** koncize skizis la kulturajn rilatojn inter Nederlando kaj Mezeŭropo kiuj ĉiam estis tre fortaj.

Registara konsilisto Artur Müller-Wien de **Aŭstria Asocio de Ligo de Nacioj** interesplene raportis pri „Necesaj kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj en Eŭropo" kaj aludis, ke en ĉi tiuj rilatoj mankas inter komprenigilo — Esperanto.

Inĝ. Pawlos Gianelia, reprezentanto de la **Greka Registaro,** pritraktis la modelan reformon de la impostoj.

S-ano **Scherer**-Los Angeles pri „Per unu lingvo tra la mondo". Li menciis la faktojn, ke li nur per la angla lingvo ne povis sukcesi en sia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, sed ke li bezonis Esperanton, kiu ne nur malfermis al li la pordojn sed ankaŭ la koropn de la helpopretaj s-anoj. Tion li speciale spertis en Japanujo.

Magistro Höfert-ČSR pri „Ex oriente lux — el Mezeŭropo savo!". El oriento venis Kristo, kiu alportis la lumon. Sed tamen ĉie regas malpaco. Devis veni Zamenhof por interligi la homaron per unu komuna lingvo. Odo Bujwid.

Ekskurso al Kahlenberg—Grinzing.

En pli ol 20 aŭtobusoj la s-anoj veturis al sur Kahlenberg. Urbo Wien konstruigis tie belegan suraltaĵŝoseon, kiu per grandaj turniĝoj kondukas al la supro de Kahlenberg. La ŝoseo mem jam estas vidindaĵo, sed la panoramo sur la urbon estas unika. En la restoracio oni trinkis bonan Vienan kafon, manĝis kukon kaj amuzis sin diversmaniere. Poste la aŭtobusoj venigis ilin tra Kobenzl, kie oni ĝuis denove belan elrigardon sur alian parton de la urbo, al Grinzing, kie en la ĉarma restoracia ĝardeno Hengl ĉe ĉi-jara vino, bona muziko kaj kantisto la tempo forpasis rapide ankaŭ por tiuj, kiuj nur je meznokto volis reveturi al la urbo. S-ano Schlerka kantis kelkajn kantojn en E. al sia liuto kun grandsa aplaŭdo.

11. de aŭgusto:

„Espero Katolika": „... solena diservo en Minoritenpreĝejo. Predikis P. **M. Carolin** pri ‚Katolikismo kaj Esp.' La Sankta Meson celebris **P. Poell.** La multnombraj ĉeestantoj preĝis kaj kantis el preĝareto de **P. Meŝtan** kaj el Kantaro Katolika (po 80 g. kun afranko havebla ĉe L. Chiba, Wien IV., Schaumburgergasse 5).

Festkunveno okazis posttagmeze en Prälatensaal de Schotten-abatejo. **Prez. Chiba** de KUE-Wien salutis kaj **Prioro Knapek O. S. B.** transdonis bonvenigon nome de la forestanta domestro **Abato d-ro Hermann Peichl. IKUE-prez. Heilker** el Nederlando skizis la gravegan taskon de la katolika E.-movado en ĉi tiu dekadenca tempo, kies sola savo estas Kristo, kaj la praktikado de

...a plej alta leĝo „Amu vian proksimulon!“ ...-ro Kao, franciskana pastro el Ĉinujo, ...kcentis la grandan valoron de E. por la ...isia agado. P. **Hasenhütl O. F. M.** el Wien ...l la komuna lingvo devas kuniĝi la eĉ ...li grava komuna, vere katolika sento'. ...**Poell** atentigas pri Int. Katolika Infor...ejo. P. **Carolfi** faris impresplenajn ...diaŭajn vortojn.“

„**Nia Gazeto**“: „... dum la du laborkun...doj oni preskaŭ nur diskutis pri ŝanĝo de ...EA-sidejo kaj translokigo de UEA-biblio...eko. Ĉu bezone raporti pri ĉio ĉi? Mi ...inias, ke ne, kvankam dum tiu senfina ...iskutado obstinulo ekkriis vulkane: „Mi ne ...emis ĉi tien por ekskursi!“ komprenigante ...ni, ke li estus feliĉa se nur oni daŭrigus ...laborkunsidojn dum la tuta tago, parto ...la nokto kaj rekomencu la sekvontan ...gon. Kongresano restas turisto, kiu ne ...olonte oferus ekskurson por ĉeesti labor...unsidon ... Oni do parolis, reparolis, ...iskutis, rediskutis kaj el tiu abundo ...vortoj mi nur rimarkigis la klarigojn de ...eneralo Bastien, jam publikigitajn.“

L. Pauvrehomme.

„**Nederlanda Esperantisto**“: „... Raporto ...i la laborkunsidoj de UEA ne povas esti ...om kontentiga. Ĉeftemo estis kaj ĝis la ...no restis la translokigo de la sidejo al ...ondono kaj de la biblioteko al Vieno, kvan...am 80% de la voĉdonintaj delegitoj jam ...tis aprobintaj ĝin per referendumo. La ...ntraŭuloj (svisoj) ne volas ĉesigi la pro...don antaŭ la tribunalo en Ĝenevo, pro...do, kiu absolute malebligas la funkciadon ...UEA kaj kies daŭrigo, laŭ la vortoj de ...ez. Bastien en la ferma kunsido, alportos ...morton de UEA. La komitato komisiis lin ...stfoje klopodi en Svislando pri agordo. En ...zo de malsukceso la komitato ne hezitos ...liki la necesajn, antaŭviditajn aranĝojn. ...speru ni, ke finfine ankaŭ ĉe niaj svisaj ...mikoj venkos esperantismo personan ambi...on aŭ venĝemon.“

Unua laborkunsido.

Je 9 h 20 UEA.-prez. **generalo Bastien** mal...rmas kaj anoncas la programon: 1. daŭrigo ...e la salutoj, 2. parolado de la prezidanto, ...kutima diskutado.

1. **D-ro Adam Zamenhof** salutas nome de la ...milio aludante la rolon, kiun ludis Wien en ...vivo de Zamenhof.

W. de Cook-Buning, dua prez. de Auxiliary ...anguage-Association, reprezentante s-inon ...orris, salutas la kongreson kaj la E.-movadon, ...avanta komunan celon kun la nomita asocio. ...rez. Bastien petas la parolinton, transdoni al ...-ino Morris la bondezirojn de la kongreso.

Ŝapiro salutas nome de la urbestraro de ...yalistok, la naskiĝloko de Zamenhof, kaj ...vitas al vizito okaze de la kongreso 1937.

2. UEA-prez. **Bastien** parolas: „... en ...ŭgusto 1934 UEA faris financajn promesojn. ...n la Roma kongreso estis plendoj pri neple...umo. UEA ne estas komerca afero, ĝi devas ...oni al siaj membroj pli ol nur sliparon kaj ...rlibron. Sed la monrimedoj ne sufiĉis por ...ungi helpanton al s-ro Kreuz. Lia subita ...morto metis nin en grandan embarason. Jam ...ost tri tagoj alvenis s-ro Movo el Paris, sed ...o nur estis provizora solvo, ĉar laŭstatute la ...direktoro estas elektota de la komitato.

Jam de unu jaro komitatanoj insistis forlasi ...enevon. Unue mi rifuzis, ĉar Ĝenevo estas ...imbolo kaj sidas en neŭtrala lando. Sed unu ...aro montris, ke la transloĝiĝo estas necesa. ...El 21 bultenoj 17 akceptis principe la ...anĝon, sed nur simpla plimulto preferis Lon...donon. Mi uzas la okazon por publike gratuli ...-ron Goldsmith pro lia elekto.

UEA nun komencas novan vivon. Malmgren kaj Petit jam komencis siajn laborojn. Alia projekto volas liberigi la direktoron de la redaktado de la revuo. Tiel ni ŝparas monon kaj tempon. La printempa kunsido en Ĝenevo decidis tujan efektivigon. Sed kelkaj svisoj ne akceptis tiun decidon. Ili sin turnis al Ĝeneva tribunalo kaj tiu ĉi trovis necesa voĉdonadon de la delegitoj. (La sola motivo kontraŭ la ĝenerala voĉdonado estis la deziro al pli rapida solvo.) La voĉdonado rezultigis 887 „jes“ de delegitoj. La protestantoj protestis, ke la voĉdonado ne okazis laŭregule. Dume ni esperas interkonsenton.

Sed la budĝeto ne estas kontentiga kaj ni atendas deficiton. Nur en la venonta jaro ni ricevos la rezultojn de niaj klopodoj.“



Univ. prof. d-ro Odo Bujwid
prez. de Somera Universitato.

3. **Diskutado:**

D-ro Medrkiewicz: Estas grava momento en nia movado, estas faritaj gravaj decidoj. Sed ni estas malmulte informitaj. Oni motivigas la transporton de la centra oficejo per financaj kaŭzoj, sed mankas financa raporto. Tial la esp-istoj ne komprenas. Sed io alia ŝajnas al ili grava: Intern. neŭtrala organizo laŭ propra bezono kaj laŭ statutoj devas esti en neŭtrala lando. Dum la mondmilito la centrejo estis en Genevo kaj tial UEA kapablis fari multajn kaj gravajn servojn al s-anoj en multaj landoj. La translokigo estas ankaŭ kontraŭ § 5 de la statutoj. Oni devis unue ŝanĝi la statutojn, por tio oni devis voĉdonigi la delegitojn. Sed por tio oni bezonis unue tiurilatan decidon de la komitato. Mi aŭdis, ke ne ekzistas protokolo pri tio. Tial laŭ jura vidpunkto la okazigita voĉdonado ne validas; svisaj s-anoj protestis antaŭ tribunalo kaj la proceso ankoraŭ daŭras. Laŭ la statutoj ankaŭ la monkalkulado, la prezoj kaj la librotenado devas esti en svisa mono.

Nun pri la decido pri divido de UEA: La propagando estu en Stockholm, la biblioteko en Wien, la direktoro en Londono. Ĉar provizore ekzistas du oficejoj: Londono kaj Ĝeneve, ŝparo ne estas videbla. Koncerne la bibliotekon: En UEA ĝi estas posedaĵo de la esperantistoj. Sed en la ŝtata internacia Esperanto-Muzeo la titolo de propreco ĉesas. Mi atentigas pri la politikaj eblaĵoj. Deziresprimo: 1. la estraro kaj komitato de UEA sekvu la statuton, 2. centra oficejo restu en Ĝenève.

D-ro Spielmann: UEA jam havis ŝuldojn, kiam ĝi ricevis monon de Hodler. Ĉu ni ne timu, ke la tuta biblioteko estu publike bruligota? (Vere amike pri la gastlando! Ni energie protestas kontraŭ tio! AEA.)

Golobić: Ni veraj esp-istoj deziras havi fortan organizon egale en kiu ajn lando kaj, ke oni enkonduku E-on en la lernejon. La statuto ofte malhelpas; oni ŝanĝu ĝin, por povi pli bone labori.

S-ino Dresen: Komenciĝis ia kaŝo en UEA. Ni volas scii, kio okazis, la estraro prezentu ciferojn. Ankaŭ pri translokiĝo ni ĝis nun ne aŭdis konvinkajn faktojn.

Ŝapiro: Ni povas esti por Ĝenevo, por Londono, sed ne por 4 UEA. Per la discentrigo oni malfaciligas. La dispecigo de laboro estas forŝovo de respondeco al aliaj. Laŭstatute nia societo estas neŭtrala. Kial en protokolo por Kolonjo troviĝas propagando por nacia ŝtato?

Lejzerowicz: proponas rezolucion: „La 28-a rekomendas al la gvidantoj de UEA, reveni al la idea bazo, sur kiu ĝi estas fondita, konforme al la § 1 de la statuto, ĉar nur tiu ĉi idea bazo garantias al ĝiaj diversnaciaj membroj harmonian kunlaboron kaj al la organizo mem regulan disvolviĝon en kadro de Zamenhofidea atmosfero.“

Borel: Protestas kontraŭ la sekreta diplomatio de la estraro. Demandas, ĉu la angla leĝo postulas anglan direktoron por intern. societoj.

Goldsmith: Ne.

Movo: Statutoj ne estas por esti ŝanĝataj laŭ momenta bezono. La decido de tribunalo estas deviga; laŭ ĝia decido provizora la mono kaj la biblioteko devas resti.

Bastien: Respondoj mallongaj al:

1. Neŭtrala lando: Supozu, ke UEA estis 1914 en Belgujo, kies neŭtralecon garantiis multaj landoj, sed tamen ne restis; 2. dispartigo: laboremaj homoj ne povas loĝi en Geneve aŭ Londono; ni ne malpermesu laboron, ĉar ĝi ne okazas en Londono; 3. kotizo: ni nepre devas havi vojon, por vivi per malmulta mono; 4. statuto: mi ne estas advokato, mi demandis la komitaton, ĝi diris jes por Londono, sed devis sin turni al la delegitoj; 5. En neniu de miaj skribaĵoj estas atakoj kontraŭ personoj. Mi nur diris, ke la mastrumado estis malbona. Oni ne apelaciu min pro artikoloj en E.-gazetoj.

Goldsmith: Kiam UEA havis 8000 membrojn, ĝi havis deficiton de 1000 fr. Budĝeto por Londono je 4000 membroj sen deficito, sed povas vivi bone kun jarlibro kaj 12 numeroj de gazeto kaj eĉ kun pluso.

Malmgren: En Romo mi parolis kun Kreuz kaj sekve kun Petit kaj Goldsmith ellaboris planon por pli bona laboro. Ni nur dividis la laboron, sed ne la organizon. Restas unu centra oficejo. Mi min turnis ne al la e-istoj, sed nur al la landaj asocioj.

Fermo je 11 h 30.

Akcepto en la Urbdomo:

„**The British Esperantist**“: „Tagmeze la kongresanoj estis akceptataj en la urbdomo de la reprezentanto de Urbo Wien, Supera Senata Konsilisto d-ro Maly. La filino de la majstro Lidja transdonis al li arĝentan kongresinsignon kaj duan por la urbestro eksvickanceliero Richard Schmitz. D-ro Maly akceptis en la belega Festsalonego de Urbdomo, bonvenigis la gastojn kaj diris, ke Vieno estis ĉiam urbo de arto kaj scienco kaj ankaŭ kultura centro, kiel atestas la konstruaĵoj, monumentoj, sciencaj kaj kulturaj kolektaĵoj. Vieno estas la centro de interpopola paciĝo kaj kontentigo. Samcele servas Esperanto, tial Vieno havas multan komprenon por ĝiaj celadoj. La parolanto finis, dezirante, ke la kongreso estu mejloŝtono sur la vojo al fina venko.

Ekparolis nun prez. de UEA generalo Bastien. Post dankaj vortoj li konfesis, ke veninte al Aŭstrio kaj speciale al Vieno, li sentis, kvazaŭ ĉiu parolas Esperanton. Vieno estas vera grandurbo kaj estu plej granda laŭdo, ke li komparas tiun urbo kun Parizo.“



La postkongresa „Tra Aŭstrio"-aŭtobuso.

Sidantaj: Ehrenreich (la gastejestro en Melk), s-ino Wanda Zamenhof, vicurbestro de Melk, d-ro Adam Zamenhof, Ludoviko Zamenhof, kort. kons. Steiner, d-rino Zofja Zamenhof, s-ino Maria Steiner, van Bellen; starantaj: 1. vico: la ŝoforo, Pomerol, f-ino Winkelhofer, Wooding, Mooij, f-ino Bergström, f-ino Lehnen kun frato, s-ino Staes, f-ino Kaes, f-ino Herzog, Führich (Esp.-ŝoforo en Melk); 2. vico: s-ino Palikova, s-ino Hermelin, s-ino Cizkova, f-ino Staes, d-ro Lothar Steiner, f-inoj Neumann kaj Feldmann.

Prez. Steiner tradukis la paroladojn kaj poste prezentis la eminentajn esp-istojn al la reprezentato de la urbo. Poste okazis rigardado de la salonegaro de Urbdomo, poste fotografado antaŭ Urbdomo.

Fakkunsidoj diversaj posttagmeze.

Vespere parto de la kongresanoj faris **rondveturadon sur Danubo** per ŝipo de DDSG. Pli ol 300 s-anoj sub la gvidado de d-ro Steiner ĝuis la belan veturadon, dum kiu 3 f-inoj ludis bonan „Jazz"-muzikon. Oficejestro de la ŝipkompanio barono Röll faris per laŭtparolilo salutparoladon, kiun kalkulkons. Frey tradukis E.-en.

Alia parto veturis al **Prater,** la fame konata Viena amuzejo, amuzis sin tie per la diversaj amuzaĵoj, reveninte hejmen tre malfrue.

12. de aŭgusto:

Somera Universitato (dua konsido).

S-ano Ikegaua-Tokio parolis pri japana kulturo. La japana etiko estas pli firme bazita sur la idealoj de la familio ol en Eŭropo.

Prof. d-ro Kamaryt-Bratislava pri Filozofio en Ĉeĥoslovakio. Li inter aliaj citis multajn verkojn de la prezidinto de l' Respubliko s-ro Masaryk, kiu en multaj rilatoj antaŭiris sian epokon.

D-ro Spielmann-Bern, prez. de ILEPTO priparolis sian agadon por enkonduki E-on en la poŝtaj rilatoj. La lasta Kongreso en Kairo akceptis E-on.

D-ro Medrikiewicz-Lublin postulas, ke oni faru paŝojn ĉe la registaroj pri la oficialigo de E. Ligo de Nacio devus ĝin akcepti.

Dir. Schamanek respondas, ke ĝis nun Ligo de Nacioj ne konsentas fari tion ĉi.

Dum ambaŭ kunvenoj la salono de Neue Burg estis plenigita de aŭskultantoj.

Odo Bujwid.

Fakkunsidoj okazis samtempe.

Samtempe la virinoj estis gastoj en la **Grandmagazeno A. Gerngroß, Mariahilferstrato,** kie pli ol 300 virinoj estis salutataj de Verwaltungsrat A. Gerngroß, gvidataj tra la magazeno kaj poste regalataj.

La gastoj ne forgesos tiun ĉi afablan akcepton!

Posttagmeze **rondveturado** en 12 aŭtobusoj tra la urbo, vizitante la plej belajn lokojn de la urbo.

Tutmonda Asocio de geinstruistoj esperantistaj (TAGE).

Sub la prezido de registara kons. **Fritz Stengel**-Wien TAGE havis sian unuan fakkunsidon. Ĉeestis pli ol 200 personoj.

Li ankaŭ, estis preparinta la TAGE-kunsidojn kune kun kalkulkons. Rud. M. Frey-Wien.

Reg. k. Stengel malfermis, salutis speciale la prezidinton de TAGE Roome-Sheffield, anstataŭantan la prezidanton d-ron Beckmann-Svedujo, kaj transdonis la salutojn de Aŭstria Ŝtata Ekzamenkomisiono, de ties prezidanto kort. kons. d-ro Wollmann kaj de unuiĝo „Domo de l' instruistaro", kiu nombras 16.000 membrojn.

S-ano **Roome** laŭtlegis salutleteron de prez. d-ro Beckmann.

E.-instr. **kalk. kons. Frey** laŭtlegis kelkajn alvenintajn interesajn leterojn kaj oni decidis publikigi ĉiujn en la oficiala organo de TAGE, por konatigi ilin ankaŭ al la neĉeestantoj. Li krome laŭtlegis 4 rezoluciojn, kiuj unuanime estis akceptitaj.

Paroladis kun granda aplaŭdo **dir. Schamanek, s-ino Berger, s-ro Borel kaj f-ino Nixon.**

La jam en diversaj landoj (Anglujo, Aŭstrio, Francujo ktp.) atingitaj sukcesoj ĝojigis la partoprenantojn.

Fakkunsido de ILEPTO.

Honorprezidanto **d-ro Spielmann** ĝin malfermis. La raportoj estis tre favoraj. ĈSR donas 6-tagan eksterordinaran libertempon por kursvizitantoj en Arnhem; fakgazetoj regule raportas pri E. Ĝen. dir. Damme en Nederlando tre subtenas E-on.

En Aŭstrio estis eldonataj 50 diversaj oficialaj bildpoŝtkartoj por eksterlando kun enpresita pm. kaj klariga teksto en germana, angla, franca kaj Esperantolingvoj; ĝen. dir. Steyskal tre helpas al E.; ĉiujare elvenas reskripto, per kiu la salajruloj estas invitataj partopreni en E.-kursoj — jam en la intereso de la deĵoro — kaj oni disponigas instruejojn por ĉi tiuj kursoj.

ILEPTO postulas de ĉiuj PTT-instancoj la enkondukon de Esperanto.

Konferenco de la Virinoj.

En la plej bela kaj intima salonego de Hofburg, Ceremonia Salonego, kie dum imperiestra epoko okazis la familiaj balfestoj, okazis dum la 28-a nia Konferenco sub la prezido de **s-ino Fürth,** vicprez. de Bund öst. Frauenvereine.

La temo estis elektita en rilato al tiu de Somera Universitato, nome „**La influo de la politika kaj ekonomia situacio en Eŭropo al la situacio de la virino**".

Allasataj estis ankaŭ ne-esperantistoj tial ankaŭ aliaj lingvoj, sed traduklingvo sola estis Esperanto.

La unuan raporton faris s-ino **d-rino Alma Motzko,** konsilisto de Urbo Wien, kiun la Vien-aninoj konsideras unu el niaj plej brilaj oratorinoj kaj la s-anoj, eĉ tiuj kiuj ne komprenis la germanan lingvon, jam dum la parolado aprobis nian elekton. D-rino Motzko komencis per la laŭscienca klarigo de la nuntempa ekonomia krizo, kiu lasta evidentiĝis plej dolorige en tiuj partoj de la mondo, kie multaj altkulturaj popoloj renkontiĝis en kompare malvasta spaco, precipe en Mezeŭropo. Per ekzemplo la parolantino montris kiel la luktado pri la vivtenado, akrigita pro la ekonomia krizo, en multaj landoj sin turnas kun multobligita forto kontraŭ la virino, forprenante de ili ne nur la eblecon gajni sian ekzistadon — kaj, almenaŭ parte tiun de la familio, sed ankaŭ la rajton kundecidi en la publika vivo, kaj ŝi finis dirante, ke sen la nepre necesa kaj postulenda influo de la virinaj ŝtatanoj homoj ne sukcesos alkonduki la daŭran pacon, pri kiu ni ĉiuj sopiras.

Tradukis E-en s-ino **Feichtinger.**

La dua parolado, farita de f-ino Lidia **Zamenhof,** estis kvazaŭ detala klarigo de la lasta ideo de d-rino Motzko; ŝi memorigas kiom pli la virinoj, kiel edzinoj kaj patrinoj, suferis pro la ekonomiaj kaj moralaj sekvoj de la milito ol la viroj, kiu mem partoprenis ĝin. Kiel rimedon por alproksimigi la popolojn kaj interne venki la militemon ŝi konsilis al ĉiuj — studadi E-on, sed ne nur parkere lerni ĝiajn vortojn sed penetri en ĝian internan ideon.

S-anino **Marie Borel**-Lyon konsekvence daŭrigis la temon, deduktante el ĝi la demandon „Kion do fari por esperantigi la mondon?". Ni ĉiuj scias la respondon: „Enkonduki E-on en la lernejojn de ĉiuj landoj." S-ino Borel lasis la detalojn de ĉi tiu temo al la kunsido de TAGE sed klopodis pruvi al la ne-esperantistoj la neceson de nia postulo kaj samtempe montri per ekzemploj la facilecon de E kompare al naciaj lingvoj.

Ĉar la tempo urĝis, oni demandis la aŭdantaron, kiu deziras la germanan tradukon de la du en E. faritaj prelegoj kaj el 150 ne-esperantistoj nur 5 petis, la aliaj komprenis. Entue ĉeestis pli ol 300 personoj.

D-ino Motzko sen scipovi nian lingvon eĉ ripetis al mi la ĉefan enhavon el la du paroladoj.

La valoro de la Konferenco ne nur konsistis en la vere valoraj raportoj sed ankaŭ en tio, ke per ĝi multaj ne-esperantistoj konatiĝis kun nia movado kaj interesiĝis pri ĝi.

La nura fakto, ke **Ligo de Virinaj Unuiĝoj en Aŭstrio,** kiu reprezentas sub la prezido de **s-ino Maria** Hoheisel 49 unuiĝojn, estis akceptinta la teknikan aranĝon

...aj la prezidantecon de la Konferenco, ...m multe helpos al nia movado.

F. Feichtinger.

Fakkunveno: Teknokratio kaj Etiko.

En salono de Kulturklub kunvenprez. ...ech-Wien dankas al la gastiganto prez. ...-ro Wilhelm kaj mencias la valoron de E. ...or ĉiuj kulturaj kaj sociaj celadoj.

D-ro E. Pfeffer en enkonduka parolado ...ubstrekis la gravecon de E. por progresigo ...e la homaro.

Karl Nebenzahl-Wien skizis en la ĉef-...parolado „Teknokratio, la vojo al ĝenerala ...nfarto" la vivon de filozofo Popper-...ynkeus kaj ties ĉefproblemon „Ĝenerala ...utrodevo".

En la interesa disputo partoprenis: ...eier-Budapest, Zawada-Varsovio, Lejzero-...ics-Lodz, Nebenzahl kaj d-ro Pfeffer.

Prez. Čech invitis al kunlaboro en la ...adro de societo „Ĝenerala nutrodevo".

Radio-raporto pri la kongreso.

La reprezentantoj de la diversaj nacioj ...arolis unue en sia gepatra lingvo kaj poste ... saman en Esperanto kaj prez. Steiner ...adukis tuj germanlingven propagandcele:

Prez. generalo **Bastien-Paris:** Karaj ...samideanoj! Kun granda plezuro mi ...povas konstati, ke la kongreso vere digne ...aj belege komenciĝis en la Festsalonego ...e la imperiestra kastelo en Vieno en ...esto de la ekscelencoj vickanceliero ...aar-Baarenfels kaj ministro Stockinger, ...reprezentantoj de registaroj kaj multaj ...honorgastoj. La inaŭguron de nia 28-a ...iris la vickanceliero, finante en Esperanto.

Olliver-**Anglujo:** La elektita kongres-...komitato estas: prez. kortega kons. Steiner-...Vieno, vicprez. sekcia ĉefo d-ro Uebelhör ...aj direkt. Schamanek-Aŭstrio, prof. d-ro ...Bujwid-Polujo, d-ro Kempeneers-Belgujo, ...mag. Höfert-Ĉeĥoslovakio, prof. Waring-...ien-Francujo; ĝen. sekr. Goldsmith-Lon-...on, sekr. Werner kaj Haager-Vieno.

S-ino **Hoschtalek-Argentinio:** Kongres-...prez. Steiner dankis al Federacia Prez. ...ro la afabla letero, per kiu li petis ...gardonon pro sia foresto, promesis pluan ...subtenon al Esperanto kaj sendis salutojn ...al ĉiuj kongresanoj.

D-ro **Kempeneers-Belgujo:** (Unue flandre, ...poste france.) Federacia kanceliero von ...Schuschnigg estis for de Vieno je ...tempo kaj anstataŭigis sin flanke de ...ekscelenco la vickanceliero Baar-Baaren-...fels. Nia Esperanto-amiko ekscelenco ...Stockinger, ministro por Komerco kaj ...Trafiko, kompreneble ĉeestis kaj estis ...aparte salutata.

Prof. d-**ro Kamaryt-Ĉeĥoslovakio:** Kel-...aj registaroj estis reprezentataj kaj sekvis ...alparoladoj de ili. Poste la nepo de nia ...majstro alten tenis la flagon de la I-a ...Kongreso de Boulogne kun la subskribo ...de Zamenhof kaj akompanate de la amiko ...de nia majstro d-ro Bujwid li portis la ...flagon sur la estradon dume la orkestro ...de la policistaro ludis la himnon.

Gahler-**Germana Ligo de Esp. en ČSR:** ...Sur la flago, la unua flago kun nia insigno ...la „Verda Stelo", estas la subskribo de d-ro ...Zamenhof 1905, per kiu li akceptis la ...insignon por nia movado. La flago estas ...donaco al la muzeo.

Pastro **d-ro Kao-Ĉinujo:** Sekvis la ...paroladoj de la landaj reprezentantoj kaj ...de la fino de nia E.-pioniro kaj — poeto Leo

Antaŭ la parolado en Radio-Wien. De md. Mahrous-Egiptujo, prof. d-ro Kamaryt-ČSR, P. d-ro Kao-Ĉinujo, Scherer-Usono, Petit-Francujo, Olliver-Anglujo, Hornblow-Nov Zelando, Ikegaŭa-Japanujo, d-ro Spielmann-Svislando, generalo Bastien-Francujo, Buenting-Ned. Hinduio, Gahler-ČSR (germano), d-ro Ardebeze-Turkujo, Ludoviko Zamenhof-Polujo, prof. d-ro Odo Bujwid-Polujo, s-ino Hoschtalek-Argentinio, Harabagiu-Rumanujo, Golobiĉ-Jugoslavujo, d-ro Kalocsay-Hungarujo, prof. Facchi-Italujo, d-ro Szilagyi-Hungarujo, prez. Steiner-Aŭstrio, s-ino Dresen-Estonujo, Wittenberg (Movo)-Rusujo, d-ro Kempeneers-Belgujo, instr. Malmgren-Svedujo, Möller-Danujo, Baas-Nederlando, inĝ. Gianelia-Grekujo.

Belmont, amiko al nia majstro. Poste la kongresanaro eliris la kastelon kaj kolektiĝis sur la grandega Placo de la Herooj, de kie ili admiris la urbdomon, belege iluminitan je honoro de nia kongreso. Dankon al urbestro Schmitz.

Paul Möller-Danujo: Reirante al la festsalonego ni amuzis nin dum la interkonatiĝa vespero ankoraŭ longtempe. Dimanĉe okazis diservo en Votiv-preĝejo, celebrita de lia eminenco kardinalo d-ro Innitzer, kiu interrompis sian libertempon kaj venis nur por ĉi tiu okazo al Vieno.

Mahrous-Egiptujo: Ĉeestis ministro Stockinger kaj reprezentanto de vickanceliero Baar-Baarenfels, krome aliaj eminentuloj. Dum la diservo la polica orkestro ludis la germanan meson de Schubert. Plenplena estis la preĝejo.

Helmi Dresen-Estonujo: Post la diservo la orkestro marŝis sur Ringstrato, ludante belajn marŝojn, ĝis Placo de la Herooj, sekvata de milkapa esperantistaro. Tie sur la tombo de la „nekonata soldato" je la sonoj de la kanto „La bona kamarado" generalo Bastien kaj prez. Steiner metis florkronon.

Petit-Francujo: Post ludado de la nacia kaj Esperanto-himnoj prez. Bastien dankis al la orkestro. Posttagmeze ekskurso al plezurkastelo Schönbrunn, kie ni rigardis la belegan salonegaron kaj la bestĝardenon. Poste ni rigardis la prezentadon de „Blanka Ĉeval'".

Inĝ. Pawlos Gianellia-Grekujo: La prezentado estis tiel bona, la aktoroj tiel bele elparolis la lingvon kaj la kostumoj kaj la prezentado estis tiel ĉarmaj, ke aplaŭdo sekvis aplaŭdon kaj regis unuanime la opinio, ke tiu prezentado estis la plej bela inter la ĝisnunaj kongresteatraĵoj. — Lunde inaŭguro de Somera Universitato sub la prezido de nia pioniro profesoro Bujwid.

D-ro Szilagiy-Hungarujo: Parolis inĝ. Isbrücker nome de la nederlanda registaro pri „Kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj de Nederlando kaj Mezeŭropo", inĝ. Gianelia, reprezentanto de la registaro pri „Modela reformo de impostoj", registara kons. Müller de Aŭstria Societo de Ligo de Nacioj pri „La stato de Aŭstrio en la kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj en Eŭropo".

Prof. Facchi-Italujo: Fine parolis mag. Höfert pri „Ex oriente lux — el Mezeŭropo savo" — Posttagmeze estis ekskurso al Kahlenberg kun belega panoramo kaj finis en Grinzing, kie ĉe bona muziko kaj vino la kongresanoj sin sentis hejme.

Prof. Ikegaua-Japanujo: Meznokte ni revenis. Marde unua laborkunsido en Hofburg kun inaŭgura parolado de Adam Zamenhof. Sekvis parolado de generalo Bastien pri la kaŭzoj de la translokiĝo de UEA al Londono kaj diskuto. Daŭrigota.

Golobiĉ-Jugoslavujo: Je la 12 h akcepto en la urbdomo. Por la malhelpita urbestro alparolis senata ĉefkonsil. d-ro Maly kaj diris, ke Vieno kiel kulturcentro en Mezeŭropo jam pro sia geografia situo ĉiam havis komprenon por E. kiel interligilo por la popoloj.

Baas-Nederlando: Tial Vieno ankaŭ ĉiam subtenis la interligajn kaj interfratiĝajn ideojn de E. Antaŭe s-ino Lidja Zamenhof estis transdoninta arĝentan kongresinsignon por la urbestro kaj fiksis saman al la brusto de la reprezentanto de urbo Vieno.

Buenting-Ned. Hindujo: Poste ni rigardis la salonegojn en la urbdomo kaj fine ni denove estis fotografitaj. Dum la respondo al la reprezentanto de la urbestraro generalo Bastien diris inter alie: „Vieno similas al Parizo kaj tio estas la plej alta laŭdo, kiun mi povas diri, ĉar mi mem estas Parizano."

Scherer-Usono: Posttagmeze ni rigardis la imperiestran kastelon, nome la belegan unikan salonegaron kaj vespere ni faris rondveturadon sur ŝipo sur Danubo kaj multaj iris al Prater por amuzi sin tie.

Hornblow-Nov Zelando: Merkrede estis la dua laborkunsido. La programon vi ekscios el nia gazetaro. Posttagmeze rondveturado tra la urbo. Vespere Prater kaj veturado sur Danubo.

Prof. d-ro Bujwid-Polujo: La programo ankoraŭ estas ampleksa. Morgaŭ ekskursoj en la belegan ĉirkaŭaĵon de Vieno per aŭtobusoj aŭ trajnoj. Vendrede balfesto en la festsalonegoj de imperiestra kastelo en naciaj kostumoj.

Harabagiu-Rumanujo: Sabate bedaŭre ni devas forlasi la belan kongresurbon kaj la belan landon Aŭstrio, sed ni esperas baldaŭ reveni al ĉi tiu gastema lando, kie ni nin sentis tre bone.

Wittenberg-(Movo-)Rusujo: Sabate ankaŭ estos daŭrigata la vojaĝo Tra Aŭstrio per aŭtobusoj kaj karavano en 10 grandaj aŭtobusoj montros al la loĝantaro en la diversaj regionoj de Aŭstrio, ke 30 nacioj venis ĉi tien.

Malmgren-Svedujo: Diri ion pri la popolo necesas; la aŭstriano estas bonkora, tre kompleza homo, kiu ĝojas helpi al la gastoj kaj servas al ili ĉiamaniere. Ĉie oni kun granda ĝojo nin akceptis.

D-ro Spielmann-Svisujo: Ĉie regas bonega ordo kaj oni nun vidas, ke ofte la raportoj en eksterlando ne ĝuste trafis la



La preparlaboroj por la kongreso en la nova 300 m² granda bibliotek-ejo de Int. Esp.-Muzeo.

veron. Ni sentis nin vere bone en ĉi tiu gastama lando.

D-ro Ardabeze-Turkujo: Kaj Vieno, ĉi tiu ĉarma urbo kun siaj belegaj konstruajoj, Ringstrato, Prater, Grinzing kun sia ĉijara vino, la belega ĉirkaŭaĵo, ĉio ravigas.

Kotov-Bulgarujo: Ĉie oni sentas la muzikon, la gajecon de la popolo. La memorlokoj al multaj majstroj de l' muziko Strauss, Beethoven, Mozart, Lanner ktp. Kaj ni ne volas fini sen danki al la registaro pro la subteno al E. kaj al ĉi tiu kongreso kaj same al la urbestro de Vieno. Vivu Aŭstrio, vivu Vieno!

Ludoviko Zamenhof: Kiel la plej juna ano de familio Zamenhof mi elkore salutas vin nome de la familio.

13. de aŭgusto.

Ekskursoj.

1. al **Rax-alpo** per 8 aŭtobusoj ĝis la malsupro, poste per kablofervojo 2000 m supren. Belega panoramo. Tagmanĝo en Raxhotelo. Poste reveturo malsupren samvoje, daŭrigo de la aŭtobus-veturado al sur **Semmering** kaj de tie post ioma restado al **Vöslau**, kie en la Hotelo Bellevue je belege aranĝitaj tabloj ni ricevis nian bonegan vespermanĝon. Vere agrable estis la sidado sur granda teraso ĉe la sonoj de muziko. Post la 22 h ni revenis al Wien. Gvidanto d-ro Lothar Steiner.

2. per fervojo 50 personoj al **Puchberg** kaj de tie per dentradfervojo al la supro de **Schneeberg** (2000 m). Bona tagmanĝo en la hotelo Hochschneeberg. Posttagmeze aparta trajno por la kongresanoj returnen al Puchberg, kie ili vespermanĝis, poste per fervojo al Wien. Gvidanto Alice Falk.

3. aŭtobuse 66 personoj veturis al urbo **Mödling**, al abatejo 800-jara **Heiligenkreuz**, kiun ili vizitis, poste al **Baden**, bona tagmanĝo en hotelo Stadt Wien, rigardo de la urbo, vespermanĝo en Gumpoldskirchen. Gvidanto Finkenzeller.

4. **Al Melk—Krems.** Matene forveturo de Wien per aŭtobusoj sub la gvidado de gesanoj Weber al Melk, tie vizito al la bela abtejo, poste veturado al Dürnstein. Raporto de E.-grupo en Krems. „Okaze de la kongresekskurso la 13. aŭg. kelkaj s-anoj de nia grupo akceptis la gastojn jam en Dürnstein (parte en naciaj kostumoj de Wachaŭ), kie okazis la tagmanĝo kaj vizitado de la abateja preĝejo kaj ruino Dürnstein, iama malliberejo de la angla reĝo Rikardo Leonkoro post lia reveno el la milito kontraŭ la nekredantoj. Ankaŭ en Krems ni gvidis kaj montris la vidindaĵojn de nia antikva urbo. Fine estis gaja kunestado en la gastejo Ehrenreich kun komuna vespermanĝo. Laŭdire la urbo plaĉis al niaj gastoj".

E.-grupo: Kern, Protiwinsky.

Nokte la ekskursanoj revenis plenkontente al Wien.

14. de aŭgusto:

2. Laborkunsido.

Prez. Bastien memorigas pri la mortintoj de la lasta jaro: Arabeno, Arnhold, Kreuz, Merchant, Cuadra, Petiau, Rischek. La s-anoj leviĝas.

La prez. laŭtlegas bondeziran telegramon de kanceliero Schuschnigg.

Poste vicurbestro de Karlsbad s-ano **Fr. Ulbert** salutas en E. nome de la 4 banlokoj germanaj en ČSR: Karlsbad, Marienbad, Franzensbad kaj Teplitz-Schönau. Li invitas viziti ilin kaj je tiu okazo ankaŭ rigardi la unuan Esp.-monumenton en Eŭropo, nome en Franzensbad.

Bastien: Dispecigo ne ekzistas, nur disdono de la laboroj, kio multe povas helpi. La vivo en Francujo ne estas pli malmultekosta ol en Anglujo, plue ni ne povas ŝanĝi la sidejon kun la prezidanto. Ĝeneve ne alportis al ni multan sukceson. Pri la gazeto: Oni ne povas malhepi la fondon de novaj gazetoj. Koncerne neŭtralecon en Köln: Mi konsentas kelkajn punktojn, sed ni ne povas aliigi la mondon, nur bedaŭregi tiajn persekutojn. La plej priokupita afero ŝajnas esti la stato de UEA. Jen: Antaŭ kelkaj jaroj UEA estis mallerte gvidita en kelkaj punktoj. En Stockholm la gvidantoj ŝanĝiĝis. En septembro 1934 oni faris bilancon en Ĝenevo: ŝuldoj 40.000 sv. fr. Ekzistas 2 kapitaloj: la asocia (fondo Hodler) kaj la garantia (de la dumvivaj membroj), kiu estas relative malgranda kaj nur fariĝas posedaĵo de UEA post la morto de la donacintoj. Bedaŭrinde ne nur „asocia" kapitalo estas for, sed preskaŭ ankaŭ la „garantia", uzita por ŝtopi la truojn de la tro grasa budĝeto. Mi ne suspektas la honestecon de la gvidintaj personoj, sed kritikas iliajn administrajn procedojn. Oni ricevis monon, uzis ĝin por iliaj celoj kaj tiel estiĝis multaj kreditoroj. Ankaŭ la mono por la „respondkuponoj", konservenda, estis uzita. Ni repagos ĝin, sed ni devas preni de la malgranda kapitalo.

Ni ne nur devas reguligi nian budĝeton, sed ankaŭ trovi monon por propagando. UEA devas esti impulsa centro de propagando. Nia unua zorgo: havi sendeficitan budĝeton. Aliaj esp-istoj nur bezonas zorgi pri ideala parto, la komitato devas ankaŭ zorgi pri la materiala.

Diskutado:

D-ro Medrkiewicz: UEA estis administracie kaj idee sur malbona vojo. Ĉefa celo por UEA estis fiksita 1932 en Krakovo „Internacia Konferenco de la registaroj pri interŝtata kontrakto pri deviga instruado de E. sub formo de unu-jara kurso." Tiu temo estu diskutota en Varsovio. Ni rajtas postuli de la registaroj subtenon, ĉar E. estas grava por ĉiuj internaciaj fakoj kaj ĉar nia pago de impostoj rajtigas al kompenso.

Lejzerowics: Ni devas eluzi psikologian momenton, la amon de la esp-istoj al E. Estas necese „Fondo" sub la nomo de Zamenhof. Obolo, al kiu ĉiu esp-isto devas pagi almenaŭ 1 sv. fr. po jaro. Ĝi estu prenota ankaŭ de ĉiu spezo en la movado, de ĉiu kurso. La kvitanco rajtigu partopreni en la balotoj pri internacia organizo. Antaŭ 5 jaroj Bagh havis similan planon.

D-ro Spielmann: Financoj: 1. oni pagis en diversaj landoj diverse. Estonte estu samaj kotizoj. 2. UEA verku ĝeneralan propagandilon por enigi E-on en la internaciajn administrarojn, 3. por enigi E-on en la lernejojn, 4. koncerne translokiĝon ni subordiĝos nur al la leĝo.

Lidja Zamenhof: La financoj de UEA ja delonge lamas. La biblioteko estas propraĵo de UEA. Nun oni faras donacon al ŝtato; ĝi vivas en duba epoko, kiam oni per libro nutras fajron. Kiu pagos la kostojn de transporto, laŭdire ne malpli ol 1000 sv. fr.?

Bastien: La biblioteko de UEA konsistas el la unua fundo, donaco de Svisa E.-Soc. en 1912/13 — ni interkonsentis, ke ĉi tiu plej malnova parto restos en Ĝenevo — kaj el la libroj poste senditaj, kiuj ankaŭ troviĝas en multaj aliaj bibliotekoj. Nur pri tiuj temas. La translokigkostojn mi ne precize scias.

Lidja Zamenhof: Mi ne ricevis respondon pri la morala sorto de la biblioteko. Ĝi fariĝis propraĵo de la svisa societo. Kaj kio pri ĝia sorto en alia lando?

Bastien: La svisa societo „rezignas jure rajton, sed deziras, ke la biblioteko restu en Ĝenevo". Oni ĝis nun ne komunikis al mi siajn kondiĉojn.

Ŝapiro: F-ino Zamenhof faris konkretan demandon. Ni ne deziras, ke la biblioteko estu en certa loko, sed ĉe UEA. Ĝi estas propraĵo de la tut — monda esperantistaro kaj ni devas gardi ĝin. La kongreso elektu komision(on) Spielmann, Rosenstock, Borel, Dresen, Bleier, Medrkiewicz, Lidja Zamenhof kaj Ŝapiro. Ĝi pritraktu la aferon kaj raportu per la oficiala organo.

Borel: Oni devas atendi la decidon de la tribunalo.

Petit: Prave oni atentigis pri la decido en Krakovo. La nuna komitato ne kontentiĝas administri UEA sed ankaŭ volas konstrui kaj jam konstruis. Prez. Bastien kaj mi interparolis traktis kun prez. Baudet de Komerca Ĉambro en Paris kaj preparas por Pentekosto 1937 dum la Paris-a Mondekspozicio gravan teknikan konferencon kun partopreno de reprezentantoj de la ŝtatoj kaj de grandaj internaciaj organizoj. La en Paris sidanta komisiono de Ligo de Nacioj por „intelekta kooperado" patronadu la konferencon pri „enkonduko de Esp. en la praktikon kaj la lernejojn".

UEA ne estas nur Eŭropa-afero, sed tutmonda. En la ekstereŭropaj landoj la s-anoj ĝis nun laboris preskaŭ sen helpo. Prez. Bastien komisiis min, ekrilati kun ili, kaj mi povas raporti pri fondo de landa asocio en Egiptujo, preparo de Tutamerika Asocio kaj progresoj en Kuba kaj Nederlanda Hindujo. Sed nia celo estu alproksimigi kiel eble plej intime ĉiujn esp-istojn en la mondo, egale ĉu ili apartenas al neŭtrala, laborista aŭ alia organizo. Mi ekrilatis kun diversaj internaciaj organizoj kaj jam ricevis jesan respondon de IKEU, SAT kaj IPE. El Leningrad mi sciiĝis, ke IPE rajtas sendi delegiton al permanenta internacia komitato por enkonduko de E. en la lernejojn. Ni devas havi delegitojn ankaŭ en landoj, kie UEA ne estas reprezentata. La venonta kongreso jubilea en Varsovio estu grandioza manifestacio de unueco de la esp-istoj tutmondaj! La kongreso dezirespriman: 1. Ĉiu ano de UEA devas partopreni en la

...ubilea kongreso, 2. UEA invitu ĉiujn aliajn ...-organizojn kaj grupojn, sendi delegitojn, ... UEA sendu dum la jubilea jaro reprezen...anton al ĉiu internacia kongreso, 4. ĉiuj ĝis ...un neorganizitaj esp-istoj fariĝu membroj ...e UEA.

Medrkiewicz: Mi timas, se E. faros fronton ...un IPE, oni malpermesos E-on ankaŭ en ...liaj landoj. Nia movado nur povas disvolviĝi ...ur bazo de neŭtraleco kaj respekto de havaĵo ...aj propreco.

Petit: Nun estas favora tempo alceli unuigon. ...a esp-istoj ja ne devas batali unuj kontraŭ ...a aliaj, sed alproksimiĝi. Ni kunvenu nur pro la ...ono de E. kaj ne por politikaj celoj. Ni povos ...unveni same kiel la registaroj en Ligo de ...acioj.

D-ro Kamaryt: Ni ne forgesu dankon al ...rez. Bastien. Kiam Kreuz mortis kaj UEA ...stis rompiĝonta, estis lia netaksebla merito, ...e li kuraĝe daŭrigis la aferon. Proponas ...nan rezolucion: „La 28-a kun atento akcep...s la deklaron de prez. Bastien, laŭ kiu la ...ersonan honestecon de la antaŭa gvidantaro ...enio povas tuŝi. Pro tio ni petas la redak...rojn de la E-gazetaro, ke ili ne plu presigu ...ludojn, kiuj ebligas miskomprenon pri la ...onoro de la supre menciitaj s-anoj."

Malmgren: La proponita komisiono okazis ...ntaŭ kelkaj jaroj. Unue ĝi trovis ĉion bona. ...oste oni daŭrigis la atakojn, denove elektis ...omisionon kaj ĝi trovis ĉion bona. Estraro ...ovas pli bone konstati ol efemera komitato. ...e estraro ne kapablas gvidi, simple elektu ...ovan. Ni ne estas kontraŭbatalantoj, sed ...unbatalantoj. Komprenu, ke niaj decidoj celas ...ur la bonon de la movado.

Kiam UEA komencis prepari helpon al siaj ...ocietoj, mi tre ĝojis. Ni en Svedujo plendis, ...e la landaj asocioj pagas multe kaj nenion ...icevas. Jen la traktotaj temoj: 1. kiel allogi ...omojn al kursoj, 2. kiel instigi al daŭrigo ...e la studado, 3. korespondado, 4. turistaj kaj ...ongresaj vojaĝoj, 5. prelegaj kaj teatraj vo...ĝoj, 6. gazetara servo, 7. koresponda kurso, ...generalaj konsiloj, 9. la movado ĉe skoltoj, ...ontemplanoj, sportistoj kpt., 10. konsiloj al ...propagandistoj, 11. al la organizaĵoj, 12. kurs...rangoj, 13. turistaj prelegoj, 14. ekspozicioj, ...5. Esperanto-semajno en la tuta mondo, ...6. instruista kurso, 17. ekskursoj, 18. kvaron...aj raportoj.

Antaŭtagmeze vizito de aro da s-inoj al ...rmo **Laszlo Ungar**, por rigardi la ekspozicion ...e modaĵoj, kaj poste estis regalataj.

Posttagmeze **rondveturado** tra Wien per ...ŭtobusoj, alia parto rigardis la salonegaron ...e Hofburg.

Poste okazis **diversaj fakkunsidoj**.

TEKA **kaj ISAE** kunvenis kune sub la ...rezido de **prof. d-ro Bujwid.** La unua ...demando estis, ĉu ambaŭ asocioj eldonu ...komunan gazeton kaj oni decidis kunigi „Sciencan Bultenon" kaj „Internacian Medicinan Revuon", sed konservi la ...memstarecon de la asocioj. La membroj ...de nun ricevos 6-foje po jaro la kunigitan, ...ampleksan gazeton.

Sekvis laŭtlegado de artikolo de docento ...d-ro **Weleminsky** en Praha „Specifa diagnozo kaj terapio de la tuberkulozo".

Dua instruista fakkunsido.

Reg. kons. Stengel raportas pri E.-...nstruado en Aŭstrio, pri la ekzamen...komisiono, pri lektorato en Teknika ...Altlernejo. Fine li komparas Esperanton ...kun la olimpia fajro.

Golobic pri instruado en Jugoslavujo ...kaj proponas, ke ĉiuj instruistoj petu sian ...registaron je la rajto, instrui E-on en sia ...klaso.

Adamkova (ČSR) faras provlecionon laŭ ...Cseh-metodo.

Neuzil (ČSR), iama prez. de TAGE, pri ...sia instrumetodo.

Dum la **Balfesto** s-anoj en diversaj naciaj kostumoj.

Meze prez. Steiner kun la du belulin-reĝinoj: md. Juli Toyoda-Tokio, d. Anna Krenek, Wien.

Same raportas **inĝ. Chmilinsky** (Polujo).

Zawada (Polujo) pri organizo de Pedagogia Konferenco dum la jubilea kongreso en Varsovio.

Dir Menacher salutas nome de „Soc. de Aŭstriaj E.-instruistoj".

Prof. de Mihalik, prez. de „Hungara E.-Pedagogia Societo" kaj de Hungara E.-Federacio, devis forveturi kaj sendis raporton.

E.-lektoro **prof. d-ro Sirk** (Aŭstrio) skribe senkulpigis sin.

S-roj, Roome kaj **Stengel** danke fermas.

S-ro Telling nome de Nederlanda karavano aranĝis tetrinkadon en Hotelo Palace, kie ĉeestis reprezentanto de la Nederlanda Ambasadoro. Parolis s-ro Telling, la reprezentanto de la ambasadoro, prez. Bastien kaj prez. Steiner. Estis vere bela aranĝo.

Balfesto.

En la belegaj salonegoj de Hofburg okazis la balfesto. Baldaŭ la salonegoj estis plenplenaj de feste vestitaj gastoj, inter ili multaj en belaj naciaj kostumoj.

En la pli granda salonego ludis 2 orkestroj de la policistaro en uniformo alterne valsojn kaj modernajn dancojn. S-ano Cipl mem direktis la valson, dediĉitan de li al la 28-a.

En alia granda salono kvarteto Weinek ludis popolkantojn, al kiuj kantisto kantis laŭ maniero ĉe „Ĉi-jara vino". Tiu salonego estis por la nedancantoj kaj tiuj, kiuj deziris ripozi kaj agrable babili.

Oni elektis la „Belulin-reĝinon" kaj la 1. premion ricevis s-anino Juli Toyoda-Tokio kaj la 2. Anny Krenek-Wien, la „Piccolo" el „Blanka Ĉeval'". Ambaŭ ricevis belajn donacoin el la fama porcelanfabriko „Augarten-Wien".

En paŭzo oper-kaj koncertkantistino Emy Jost-Grundmann akompanate de d-ro Erich Bachrich ĉe la piano, kantis „Nia Wien" de Kehldorfer, vortoj de policprezidanto d-ro Skubl-Wien; „Al vi" de d-ro F. E. Pamer, vortoj de Wollek, „Somerkanto" de d-ro F. E. Pamer, vortoj de policprez. d-ro Skubl, esperantigitaj de K. S. Pirchan.

Post la 2 h matene finiĝis la balfesto.

15. de aŭgusto.

3. Laborkunsido.

Prez. **Bastien** informas pri la morto de d-ro Corret. La komitato decidis jenajn honorajn membrojn: Baghy, Kalocsay, Ministro Stockinger.

Li raportas, ke li ricevis leteron de s-ro Bouvier, kiu malaperigas la esperon pri akordiĝo, anoncita en la unua kunsido, sed li daŭrigos la traktadon.

Petit: Mallonga raporto pri la 8 longdaŭraj kunsidoj de la komitato de UEA: envicigo de Estona Asocio kaj normaligo de la kotizo. UEA ne tenos plu la respondecon pri la respondkuponoj, kiu ĉesos fine de 1936. — Gazetara problemo: por unu jaro interkonsento kun s-ro Jung pri kunigo de „Esperanto" kaj „Heroldo" (aplaŭdo). Interkonsento kun Cseh-instituto alcelita, sed ne ankoraŭ atingita. Venonta Kongreso 1937 en Varsovio, por 1938 ankoraŭ ne decidita, sed verŝajne en la nordo; 1939 kaj 1940 en ČSR kaj Nederlando. Ĉiuj komitatanoj estas kongresanoj. — Gazetservo: speciala paĝo en Heroldo kun artikoloj tradukotaj en naciajn lingvojn. — Por parolfilmo oni bezonus almenaŭ 50.000 fr. Nun Goldsmith estas komisiita, intertrakti pri filmado de kongreso. — En ČSR ambaŭ landaj asocioj estos invitataj de UEA, aparteni al ĝi kiel du sekcioj de sama asocio. Por Belgujo komitatano d-ro Kempeneers alcelu saman aranĝon.

Bastien publike dankas al la komitatanoj.

Frey, vicprez. de AEA, laŭtlegas la rezoluciojn de la instruista fakkunsido, la kongreso akceptas ilin.

Malmgren: Koresponda kurso: bonaj rezultoj en Norvegujo kaj Svedujo. UEA nun preparas specimenon por la landaj asocioj. Ili studu tiun taskon. — Fakaj asocioj; 1) skolta movado: venontjare jamboreo en Nederlando, 2) ne forgesu pri bontemplanoj, sportistoj kaj pacifistoj kaj faru en tiuj medioj saĝan propagandon. Asocioj, federacioj kaj kluboj: donu laboran al la gejunuloj, ili povos agi energie, se ili estas bone gvidataj. — Laborplano: agu sisteme, ellaboru laborplanon. Konsilinde estas propaganda kaso. — Bonaj instruistoj estas riceveblaj de la Cseh-instituto. — Turistaj prelegoj: preparu bonajn prelegojn pri via lando kun lumbildoj (ne el vitro sed celuloido), kaj oni sendu ilin sinsekve al diversaj landoj. UEA estu interŝanĝ-centro. — Normplano por klubkunvenoj: konsiloj, kiom ofte oni kunvenu kaj kian programon oni havu. — Migrantaj ekspozicioj: — Esperanto-semajno estu organizata komence de septembro en ĉiu lando. Instruista kurso dum la somero estu aranĝata ne nur de la landa asocio, sed laŭeble de iu oficiala instruista institucio aŭ eĉ de la ŝtato. Konkursoj estu pli multe uzataj.

Scherer atentigas pri „Esperanto Triumfonta". Li petas, ke oni helpu al la bonvoluloj, kiuj ofereme daŭrigadas la semajnan gazeton.

Bastien dankas al la aranĝantoj, unue al la prezidanto de LKK kort. kons. Steiner kaj tiam al liaj helpantoj, speciale al s-ro Frey, d-ro Höfer, la sekretario de la kongreso Werner kaj al ambaŭ filoj de s-ro Steiner inĝ. Hugo Steiner kaj d-ro Lothar Steiner. La kongreso estas karakterizita de la protekto de multaj eminentaj personoj en Vieno kaj Aŭstrio, dank al la klopodoj de la komitato.

Kongres-prezidanto Steiner: La unuan fojon mi nun havas eblecon, paroli en kunsido de la kongreso. Mi kore dankas nome de la Komitato al la ŝatata s-ro prez. kaj pro via aplaŭdo. La komitato klopodis kiel eble plej bone aranĝi la kongreson kaj agrabligi al vi la restadon en Vieno kaj Aŭstrio. Mi dankas ankaŭ al s-ano Ulbrich pro lia redaktado de Reichspost-paĝo kaj al la helpantoj en la

kongresa oficejo speciale al la tri s-aninoj Falk, Hojtasch kaj Weber. Publike mi deziras danki al Reichspost.

Mi petas prenu bonan memoron pri la kongreso kaj Vieno. Dankon al ĉiuj kaj la komitato de UEA! Ĝis revido en Varsovio!

Petit poste transdonas al la 3 helpantinoj en la kongresejo florbukedojn kun dankvortoj.

Goldsmith: La Komitato de UEA proponas jenan rezolucion: „La 28-a konfirmas la deklaracion de Boulogne sur Mer. Ĝi estas konvinkita, ke nur la ideala bazo de Zamenhof garantias al la diversaj membroj harmonian laboradon kaj al la organizo mem regulan disvolviĝon laŭ la § 1 de la statuto de UEA."

Bujwid esprimas ĝojon pri la bona fino kaj belaj memoroj pri la kongreso.

Leo Belmont

faras la finparoladon:

La plej maljuna fil' spirita
De l' nia Majstro Zamenhof,
Mi estas preskaŭ destinita
Vin adiaŭi laŭ la pov',
Kaj danki pro la mir-kongreso,
Pro ĝiaj ĉarmoj kaj grandec',
Kaj per elkora sentimpreso,
Vin beni por la estontec'!

La prezidanto Steiner Hugo,
Do prenu nun de mia Muz',
La dankon pro la alta flugo
Pro streĉlaboroj kaj amuz'.

Li faris dank' al antaŭvido,
Per helpa registara pen' —
Laŭ trafa vorto de Bujvido —
„Modelkongreson" en Vien'!

Sed la miraklon — ĉu mi sola
Rimarkis sub ĉiela nub'?
Kion do gastamec' bonvola
Faris el ondoj de l' Danub'?

Milfoje aŭdis mi ... (Sen dubo
Mensog' ne estis ĝi, aŭ fals'!),
Ke blua estas la Danubo ...
Asertas ĝin la Strauss-a vals' ...
Sed vi Danubon blu-ŝaŭmantan
Ornamis kaj repentris ĝin
En la koloron esperantan ...
Kaj verda ond' ĝojigis min!

Verdiĝis mia kor' pro ravo
Kaj verde sonis ĝia frap' ...
Knabinoj flustras pri grizavo:
Li verdon havas en la kap' ...

Verdiĝas ĉio dum printempo
El la genia Majstr-sekret' ...
Antaŭvideblas paca tempo
Al la okuloj de l' avet'! ...

Mi vidas pacajn batalantojn,
Irantajn forte al la cel',
Kaj la standardojn esperantajn,
Venkontajn per la verda stel'.

Kaj la plugilojn el kanonoj
Mi antaŭvidas ... vidas ja
Florantan pacon el burĝonoj —
En mondo kaj en U. E. A. ...

Feliĉa antaŭ morta dormo
Mi vidas: iras junular' ...
(Bastien kaj Bujvid en bonformo —
Plej junaj en la ĉef-estrar'!)

Mi benas ĉiujn en Vieno —
En ĉarma urb' de l' afablec':
Iru batali kun hieno,
De la milita kruelec' ...

* * *

Kaj nun ... mi finas per elvoko —
Mi, plej maljuna Majstra fil' —
En nom' de Varsovi' — LKK
Per ben' de l' Tombo kaj lulil'!

Aŭskultu vi la peton avan:
Alvenu en grandnombra ar'
En atendantan vin Varŝavan
Dum grava jubilea jar' ...

Li estis filo de Polujo ...
Vi — filoj liaj — Do por vi
Troviĝos gaste ejo, ujo ...,
Ho! Ĝis revid' en Varsovi'! ...

Propramane skribitaj je la fino jenaj vortoj:
Dediĉas al s-ro Prezidanto Grandlaboremulo
Hugo Steiner
kun danka memoro Leo Belmont
15/VIII 1936.

Ŝapiro refoje invitas al vizito de Bialystok okaze de la venonta kongreso.

Isbrücker atentigas esprimi dankon al pre Bastien, kiu per forta mano gvidis la kun sidojn.

Medrkiewicz atentigas, ke li transdon rezolucion, sed ne voĉdonigitan.

Prez. Bastien voĉdonigas fermon de kongreso. „La kunsido estas finita."

La protokolinto: E. Werner.

1. rezolucio. La esperantistoj, kunvenintaj el 35 landoj al 28-a en Wien, precipe la tre multaj geinstruistoj kaj -profesoroj, dankas al s-ro la aŭstria federacia ministro por komerco kaj trafiko Fritz Stockinger pro lia gisnuna granda intereso por Esperanto kaj pro lia altvalora helpo kaj petas la sinjoron ministron, ke li bonvolu ankaŭ estonte helpi al niaj penadoj kaj subteni nian rezolucion ĉe la Aŭstria Registaro, por ke la Ministerio por Komerco kaj Trafiko laŭeble kune kun la Ministerio por Instruado aranĝu por Pentekosto 1938 en Wien oficialan Internacian Konferencon por deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn laŭ la rezolucioj 2 kaj 3.

2. rezolucio. Estas nepre necese, ke Esperanto estu enkondukata en ĉiuj civilizitaj landoj — en ĉiuj lokoj kun fremdulfrekvento — kiel **deviga** fako en la lasta klaso, resp. en la lastaj klasoj de ĉiuj fundamentaj lernejoj de dekjaraj geknaboj, sed certe antaŭ la eklernado de iu ajn fremda lingvo, ankaŭ de la latina, pro la elpruvita tre oportuna preparo por la eklerno de fremdaj lingvoj.

Pro tio la instruistoj kaj profesoroj de fundamentaj-, mez- kaj altlernejoj, kunvenintaj en Wien dum 28-a sin turnas al la registaroj, al la komercaj ĉambroj, al la radio-stacioj kaj al la instancoj por fremdulfrekvento kun la peto, sendi oficialan delegiton al tiu Internacia Konferenco, kiun kunvoki ni petas la Aŭstrian Registaron.

3. rezolucio. La instruistoj kaj profesoroj de fundamentaj-mez-kaj altlernejoj, kunvenintaj en Wien dum 28-a sin turnas al la Aŭstria Registaro kun la peto, ke ĝi, konsiderante la tre grandan sukceson de Internacia Konferenco „Esperanto en la lernejon kaj praktikon", okazinta en Wien Pentekoste 1934 kaj inaŭgurita de Ministro por Komerco Fritz Stockinger, nun preparu Internacian Konferencon rilate la devigan enkondukon de Esperanto en la fundamentajn, mezajn kaj altlernejojn en la mondo kaj ke la Aŭstria Registaro kunvoku por Penteposto 1938 ĉi tiun Konferencon.

Komitato de UEA havis dum la 28-a 9 **laborkunsidojn** kaj detale pritraktis la tutan demandaron.

Generaldirekcio de Aŭstriaj Tabakfabrikoj donacis fumprovojn (cigarojn kaj cigaredojn) al la kongresanoj. Cirkaŭ la skatoloj de la cigaredoj estis rubando kun la indiko de la kongreso kaj la verda stelo.

Dankon al la donacintoj!

Pasis la 28-a
Vivu la 29-a!

Nia jubilea kongreso okazos en Warszawa 7.—15. aŭgusto 1937.

Aliĝo jam ebla ĉe Intern. E.-Muzeo, Wien, I. Neue Burg. Al demandoj aldonu ĉiam respond-afrankon.

Kotizo ĝis 31. de januaro sv. fr. 20.—, familiano 12.50, gejunuloj malpli ol 18-jaraj 8.25.

Mi jam aliĝis. Ŝteiner.

Karaj kongresintoj!

LKK de 28-a sendas al vi donace la raporton pere de ĉi tiu numero de AE.

Vi estas invitataj daŭrigi la legadon de nia gazeto per abono, kiu kostas de novembro 1936 ĝis fino de 1937 entute la valoron de aŭstriaj ŝilingoj 6.60, sendebla ankaŭ per intern. poŝtaj resp. kuponoj. Uzu la okazon!

La plej belaj rememorajoj:

Albumo de Wien kun detala priskriba teksto en Esp. (24.5 je 16.5 cm) en bela kovrajo kun 96 bildoj pri Wien en kupropreso kun afranko ŝ 3.—.

Gvidlibro „Per aŭto tra Aŭstrio kaj Wien", 80-paĝa bela gvidlibro kun pli ol 70 bildoj afrankite ŝ 1.90.

Vidajkartoj pri la plej belaj lokoj dum „Tra Aŭstrio" (Salzburg, Ischl, Gmunden, Wels, Linz, Melk, Semmering, Raxalpo, Graz, Baden, Pack, Klagenfurt, Spittal, Heiligenblut, Großglockner, Zell am See) afr. ŝ 2.90.

Glumarkoj pri la kongreso po 100 en 5 koloroj ŝ —.60.

Kongresinsigno afrankite ŝ 1.—.

E.-ŝlosilo germana, 5 pec. afr. ŝ —.60.

E.-vortareto germ.-Esp., 36 paĝa samforma kiel la ŝlosilo, 5 p. ŝ —.60.

Ni **peras la forsendon post ensendita mono.** Vi kalkulu **resp. kup. de** UEA je 35 g., **poŝtresp.-kup.** je 60 g. En Aŭstrio alsendo **en poŝtmarkoj.**

Somera Universitato
TAGE-kunveno
Konferenco de Virinoj.

La ĉefaj partoj de la paroladoj de ĉiu nomitaj aranĝoj aperos en libroformo ple malfrue en novembro 1936. Ĉiuj, kiu siatempe mendis la Protokolon pri „Int Konferenco 1934" kaj pagis, ricevos la libron. Krome ĝi povas ankaŭ esti mendata ĉe Int. Esp.-Muzeo, Wien, I. Neue Burg.

Karaj legantoj.

La enhavo de nia gazeto estu iomete pliriĉigata. La gazeto AE enhavu de nun beletristikajn artikolojn, intervjuojn kun famaj personoj, raportojn el eksterlando kaj ĝeneralinteresajn artikolojn pri novajoj ktp.

En ĉiu numero estu kontribuaĵo de fama verkisto, ĉu originalo en Esperanto aŭ tradukaĵo.

La artikoloj estu, se eble kun bildoj.

Nur la lastaj du paĝoj estos por la movado parte en germana lingvo, parte en Esperanto.

La redakcio nun aranĝas premiokonkurson. Ensendu afable ĝis 1. de decembro 1936 artikolojn pri la plej diversaj temoj, novelojn, rakontojn, vojaĝpriskribojn ktp. Gis la 15. de dec. komitato decidos pri la premioj. Ĉiuj ensendotajoj partoprenos la konkurson.

Premioj: 1. libroj en valoro de ŝ 20.—
2. „ „ „ ŝ 10.—
3. libro en valoro de ŝ 5.—
4—10 jarabono al AE

Partoprenu ĉiu, kompreneble ankaŭ la eksterlandaj. La red. de AEA.

Aŭstrio. Esperanto en Viena Aŭtunforo. Senpage al Aŭstria-E.-Asocio estis disponigitaj du standoj en Foirpalaco kaj en Rotunde kaj tie oni disdonis 10.000 flugfoliojn kun alvoko partopreni en kursoj. En Rotunde per laŭtparolilo 10-foje po tago oni diskonigis la aranĝon de E.-kursoj kaj en Foirpalaco la kinoteatro montris bildon de la inaŭguro de la 28-a kaj alvokon al kurspartoprenado.

Aŭstrio. Ministerio por Komerco kaj Trafiko, Generaldirekcio por Poŝtoj kaj Telegrafoj en Wien sub nro 34030 eldonis ordonon al ĉiuj aŭstriaj poŝtdirekcioj, ke ili interrilatiĝu pro Esperanto-kursoj por la submetitaj salajruloj en intereso de la deĵoro kun Aŭstria E.-Asocio kaj kun la aliĝintaj E.-grupoj en la koncernaj urboj de la Liglandoj. Subskribite de Generaldirektoro Steyskal.

XVIII. **Kongreso de IKUE** en Brno elektis s-anon Leopold Chiba en Wien membro de la estraro.

Ni kore salutas! AEA.

„Tra Aŭstrio."

Aŭtobusvojaĝo por la kongresanoj.

Gi komenciĝis en **Salzburg,** kie la s-anoj jam alvenis la **5. de aŭgusto** per fervojo el la diversaj partoj de la kontinento. La ricevejo estis instalita jam antaŭtagmeze en la atendejo unuaklasa en la stacidomo, afable disponigita de la fervojdirekcio, kaj de deĵoris 6 s-anoj. Per helpo de s-ano Ing-ro Höfer, aparte sendita de Oesterr. Verkehrsbüro, kiu transprenis la trafikteknikan aranĝon de la vojaĝo, de niaj samklubanoj kaj de f-ino Lackinger el la fremdultrafikoficejo en la stacidomo ni povis enhoteligi ĉiujn s-anojn. Ni disdonis la kongresinsignojn kaj — dokumentojn. Vespere en Sternbräu okazis salutvespero, kiu finiĝis jam proksimume antaŭ la 22 h, ĉar la gastoj estis tre lacaj pro la vojaĝo. Pro tio nur parto de la intencita amuzprogramo povis esti efektivigita. Oni verspermanĝis tie; okazis salutvortoj al la gastoj, starante oni kantis la himnon kaj la filineto de instruisto Föttinger tre bele deklamis mallongan salutpoemon en Esperanto. La vere interesa parolado de s-ano Stegmüller pri Salzburg pro la tro frua fino de la kunveno bedaŭre ne povis okazi. La salutvesperon ĉeestis ankaŭ reprezentanto de kortega kons. Hofmann-Montanus de Landa Trafikoficejo.

6. de **aŭgusto:**

Matene komenciĝis la aŭtobus-veturado al kastelo **Hellbrunn,** la belega iama somerrestadejo de la regantaj episkopoj de Salzburg. Ni rigardis la ĉambraron. la parkon kaj la famajn akvoartaĵojn. Poste ni faris rondvojaĝon tra la urbo kaj niaj s-anoj gvidis la gastojn, klarigante al ili la vidindaĵojn. Ĉiuj estis vere kontentaj pri la viditaĵoj. Precize je la 11 h ni aŭskultis la sonorilludadon de la sonorilturo kaj poste la malnovan orgenon de la fortikaĵo, nomita Stier, malproksimen aŭdebla en la landon. Poste ni gvidis la gastojn tra St. Petertombejo al restoracio Stieglkeller, kie okazis la komuna tagmanĝo. Kelkaj eniris la episkopan palacon Residenz kaj katakombojn, aliaj la katedralon. La tagmanĝo estis bona kaj rapide prezentata. Je la 14 h je bela vetero ni iris al la fortikaĵo; la kafo en la restoracio sur Hohensalzburg bone gustumis kaj la gvidado tra la ĉambraro de la fortikaĵo bone plaĉis. La panoramo prezentiĝis bonege. Je 20 h 30 komenciĝis la **Hejmeca Aranĝo,** farita de Lando Salzburg je honoro de la gastoj en la ne sufiĉe granda salonego de Stieglkeller. Prezentadoj de belegaj popolkantoj kaj dancoj sukcesis ravi la alilandajn gastojn. Post la unuaj prezentaderoj **kortega kons. Hofmann-Montanus** nome de la **Landestro d-ro Rehrl** salutis la gastojn kaj aludis, ke „inter la Esperanto-movado kaj la gastama lando Salzburg ekzistas intima parenceco. Afabla alproksimiĝo, reciproka kompreno inter la popoloj estas ambaŭflanke la celado kaj la vortoj de la Ligokanto de Mozart, nia Mozart ‚Fratoj, donu la manojn al la Ligo' estas vere kaj ĝuste aplikeblaj!"

Sekvis alparolado de **vicurbestro Haupt,** kiu nome de **urbestro** de Salzburg registara konstru-ĉefkonsil. **inĝ. Wildmann** salutis la gastojn kaj petis ilin, ke ili konservu en bona memoro Salzburg-on, kiun ili vidis hodiaŭ en plena somerbrilo, kaj rakontu pri ĝi en sia hejmlando.

Ambaŭ paroladoj vekis post la E.-traduko grandegan aplaŭdon. **Prof. d-ro Christanell,** prez. de Salzburg-a E.-Grupo, salutis nome de Kongres-Komitato, AEA. kaj Salzburg-a grupo. Respondis nome de la gastoj **generalo Bastien (Paris),** esprimis dankon kaj ĝojon de la gastoj pri la vidita kaj aŭskultita kaj apostrofis la Salzburg-anojn kaj Aŭstri-anojn: „Amu vian belegan urbon, vian ĉarman patrujon!"

7. de aŭgusto:

Matene la karavano forlasis en 8 aŭtobusoj nian urbon post elkora adiaŭado.

Prof. d-ro Christanell, prof. Scheierl.

Verkoran dankon meritas nia Salzburga grupo pro ĝia helpo modela al la gastoj sub certe tre malfacilaj cirkonstancoj dum la ĉefvojaĝsezono. Speciale ni danku al prez. **d-ro Christanell, prof. Scheierl,** s-ano **Stegmüller,** UEA-del. **von Lidl,** f-ino **Lackinger** kaj al **ĉiuj aliaj.** AEA.

La karavano nun veturis al sur Gaisberg, 1286 m alten, de kie estis belega panoramo. Preter la konata somera refreŝiĝejo Fuschl ĉe samnoma lago la vojo kondukis al Lago de Wolfgang, al la lokoj **St. Gilgen** kaj **St. Wolfgang,** kie oni vizitis la gastejon „Al Blanka Ĉeval" ĉe la lago, poste la faman, antikvan preĝejon kun la mondkonata „Pacher-altaro" kaj la kapeleto de St. Wolfgang. Tra bela pejzaĝo ni alvenis en **Bad Ischl,** la iama somerrezidejo de imperiestro Franz Joseph, poste al Lago ĉe Traun kaj laŭlonge de ĝi al la ĉeflagoloko la urbo **Gmunden,** preterpasinte la du kastelojn Orth. En bonaj restoracioj okazis la tagmanĝo en belaj ejoj ĉe bele aranĝita tablaro. Poste daŭrigo de la veturado tra urbo **Wels,** kie la s-anoj akceptis la karavanon kaj fine al Linz.

Linz, ĉefurbo de Supra Aŭstrio.

Supra Aŭstrio E.-Societo sendis jam je la 16 h 8 s-anojn renkonten al la aŭtobuskaravano, kiu post 3 horoj alvenis, haltis kaj estis bonvenigata. La Linz-anoj enaŭtobusigis sin kaj gvidis la unuopajn busojn al la diversaj hoteloj, kie jam staris po du s-anoj kiel helpantoj de la alvenintoj. La organizo en nia urbo bonege funkciis kaj baldaŭ post la alveno niaj karaj gastoj troviĝis sur Pöstlingberg por vespermanĝi. Tie ilin salutis kaj kore bonvenigis la prezidanto de Supra Aŭstria E.-Ligo **direktoro Karl Wannek,** poste nome de **Landestro d-ro Heinrich Gleißner** parolis **gubernisto** de Supra Aŭstrio s-ro **Wenninger:** „Mi ege ĝojas, ke mi povas vin saluti ĉi tie. Mi deziras danki vin, ke vi prenis la vojon tra nia lando kaj nur bedaŭras, ke hodiaŭ vespere ne estas klara vetero, por ke mi povu montri al vi, kiujn belaĵojn nia lando Supra Aŭstrio prezentas, de la vastaj arbaroj en la regiono de rivero Mühl ĝis la rokmontaro de Totes Gebirge — ĉion ĉi je belaĵoj enhavas nia lando sur malgranda teritorio. Por ni la vizito de fremduloj ne nur estas aferaĵo sed kordeziro, montri al la fremduloj, venantaj en nian landon, gastamon. Mi ĝojas, ke mi vidas, ke vi vin sentas hejmece ĉe ni. Mi petas, ke vi prenu la okazon, pli bone interkonatiĝi kun nia lando kaj konservi bonan memoron pri ĝi. Mi salutas vin per (en Esp.) „Estu bonvenaj!". Sekvis la parolado de **Vicurbestro Danner:** „Permesu, ke mi salutu vin nome de Urbo Linz plej kore! Se ni hodiaŭ kiel Linz-anoj havas la okazon, vin saluti kiel reprezentantojn el multaj landoj de la kontinento kaj de la mondo, ni speciale ĝojas, ke vi ne forgesis, ankaŭ viziti ĉi tiun parteton de nia lando, nian urbon Linz. Ni ĝojas, ke pere de via komuna lingvo ĉiuj popoloj ĉi tie trovas interkonsenton. Mi deziras bone diferencigi inter sana kaj malsana internaciismo, tio signifas, ke ni ĉiuj — al kiu ajn nacio ni ankaŭ apartenas — amas nian nacion, sed ni ankaŭ amas la pacon inter la popoloj. En ĉi tiu senco — mi pensas vin ĝuste kompreni — vi ja deziras labori. En ĉi tiu senco ni rekonas vian laboron kaj tial ni vin salutas despli kore en nia ĉefurbo Linz sur la ekkonilo de nia lando kaj de nia urbo, la raviga Pöstlingberg. Vi vidas antaŭ vi la noktan bildon de Linz kaj ni opinias, ke ĉi tiu bildo restos engravurita en viaj koroj, kaj ni esperas, ke vi ne forgesos ĉi tiun urbon. Mi jam povis konstati, ke vi vin sentas ĉe ni agrable, aŭstria muziko kaj aŭstria sentado vin jam iomete kaptis. En ĉi tiu senco mi levas mian glason por la prosperado de via movado, por la bonfarto de mia patrolando kaj de la germana popolo."

Prezidanto de UEA. **ĝenerala Bastien** plej kore dankis pro la bela bonveno kaj samtempe akcentis la belecon de la lando.

Prez. Wannek lertege tradukis la germanajn paroladojn. Kolping-orkestro, disponigita de la lando kaj urbo, verartece prezentis la E.-himnon kaj krome belegan muzikan programon. Sidis kune diversaj nacianoj, anglo apud franco, ĉeho apud italo aŭ germano kaj ili bonege interkompreniĝis pere de Esperanto, sed ne nur per

vortoj sed ankaŭ per la sentado, enestanta en ĉies esperantista koro, aspiri la mondpacon. Tio unuigis la kunvenintaron kiel unu solan familion. Ĉiuj homoj, kiuj ankoraŭ ne apartenas al ĉi tiu granda familio, venu en nian rondon! La arda deziro al mondpaco — ĝi efektiviĝu!

Kugler.

Koran dankon ni diras al la Linz-anoj pro ilia modela laboro, unuavice al **prez. Wannek** s-ro **Kugler** kaj al **ĉiuj tieaj s-anoj!** AEA.

8. de aŭgusto:

Matene la karavano daŭrigas sian vojon al Wien, preterpasas la antikvan lokon **Enns** ĉe samnoma rivero kun parte ankoraŭ bone konservitaj urbomuroj kaj -turoj kaj atingas la lokon **Melk.** Vizito al la fama antikva abatejo Melk kun ĝia longa fasado de 1000 fenestroj alte sur monteto. Unika la belega baroka preĝejo, la belega biblioteko kun ĉarmaj freskoj de Kremser Schmid. Sekvis komuna tagmanĝo en du restoracioj je plena kontenteco de la gastoj. Granda parto manĝis en restoracio Bahnhof ĉe nia s-ano kaj fondonto de E.-grupo Ehrenreich, kiu elpendigis E.-flagon kaj bele ornamis la manĝosalonegon. Poste la karavano rapidis al la kongresurbo Wien.

Rimarkoj pri la veturado de Salzburg al Wien de **d-ro Höfer**: „Malagrablaĵoj ĉiam okazos dum veturado, sed la agrablaĵoj multe superis. Unue en Salzburg estis la plej bela vetero post longa antaŭe malbona. La belega Hejmeca Vespero en Salzburg en naciaj kostumoj kun la Salzburg-a danco ‚Schuhplattler' kaj kantoj restu al vi bela memoro.

Tre agrabla surprizo estis la neantaŭvidita vizito al St. Wolfgang kaj ties ‚Blanka Ĉeval', sed — kiu kaŭzis la malfruiĝon al Wels kaj Linz. Malgraŭ tiu ĉi la esp-istoj de Wels ‚atendis, atendis, atendis' kaj akceptis nin kun belaj paroladoj kaj kantoj.

La Hejmeca Vespero sur Pöstlingberg en Linz malgraŭ la malbela vetero estis brila kaj la vetero ne influis la bonhumoron.

Ĉe la enveturo en Melk 10 belegaj fraŭlinoj atendis, vestitaj per naciaj ‚Vaŝaŭ'-kostumoj. Nun du surprizoj por la vojaĝestro: 1. mankis antaŭ la rigardo de la abatejo 31 personoj, fine li trovis ilin en la abateja vinkelo, 2. pro tio, fotografado ktp. ni malfruiĝis kelkan tempon kaj pro tio 3 membroj de UEA.-komitato ne povus veni ĝustatempe al la kunsido de UEA. Franca s-anino, veturinta kun sia edzo en propra aŭtomobilo kaj ankaŭ manĝanta en Melk, invitis la 3 sinjorojn al kunveturado ĝis Vieno."

Dankon al **d-ro Höfer** pro lia helpo, sed ankaŭ al s-ro prez. **Franz-Wels**, f-inoj **Fohler** kaj **Schmierer-Vöcklabruck**, kiuj akompanis la karavanon kaj helpis.

Dankon ankaŭ al la **Wels-anoj**, unuavice al prez. **Franz** kaj s-ro **Moser.** AEA

Dua parto.

Belga Esperantisto: „Kaj poste la rondvojaĝo tra Aŭstrujo estas daŭrigata. Ĝi kondukas la partoprenantojn tra la montarŝoseoj de Semmering, de Pack kaj de Großglockner, kaj finiĝas en Zell am See, kie adiaŭas la esp-istoj unu la alian, bedaŭrante, ke tiu bela vojaĝo jam finiĝis ... Kaj ĉiuj disiras. Mi nun skribas tiun raporton en malgranda tirola vilaĝo. Antaŭ mi kuŝas altaj montoj, kies pintoj desegniĝas sur la blua ĉielo, dum nuboj envolvas ilin, je duona alteco, kiel zono.

Same, nia movado elstaras fiere por la bono de la homaro, dum flanke de ĝi disputas kelkaj pri organizo aŭ bruas pro personaj kaŭzoj ..."

P. Kempeneers, del. de Ministro por Publika Instruado.

Forveturo de **Wien** iomete malfruigita pro tio, ĉar aro da partoprenantoj ne ĝustatempe ĉeestis, ne sekvis nian alvokon, eniri la veturilojn ktp. Entute la vojaĝon faris 9 grandaj aŭtobusoj kaj aparta ŝarĝaŭto.

Sur Semmering oni trinkis kafon kaj daŭrigis al Graz malfruigite. Unue ni veturis al **Annensäle,** post kiam la Graz-aj s-anoj estis atendintaj nin ĉe la urbolimo.

En la bela salonego okazis, dume ni ĉe bele aranĝitaj tabloj manĝis, bela programo: Muziko: koncertorkestro Bauer-Stryeck; anoncado kaj humoraĵoj: Igo Wallner; teatrogrupo: direkt. Frankl. La programo ege plaĉis al la gastoj.

Salutis la gastojn la prez. de E.-Societo por Stirio kolonelo **Hackl** kaj poste sekvis paroladoj.

Registara ĉefkonsilisto d-ro Manfred Jaky.

S-ro Landestro de Stirio **d-ro Stepan,** je sia plej granda bedaŭro malhelpita sekvi vian inviton, ordonis al mi saluti vin en lia nomo plej kore. Kun speciala ĝojo ni akceptas vin en Stirio kaj esperas, ke vi estos plene kontentaj pri la impresoj akceptitaj ĉe ni.

Esprimante la deziron, ke vi dum via vojaĝo ankoraŭ havos multajn belajn kaj impresplenajn horojn, kaj petante vin, ke vi diskonigu en via hejmlando la belaĵojn viditajn, por varbi multajn amikojn por nia lando, mi elkore dankas pro via vizito.

La popol-interliga kaj — interpaciga ideo, kiun la esperantistoj skribis sur sian standardon, plensukcese daŭrigu sian agadon kaj akceptu nian aserton, ke vi ĉiam kore estos akceptotaj en nia hejmlando Stirio kaj nia patrolando Aŭstrio.

D-ro Meeraus, reprezentanto de la urbestro **Schmid** de Graz, kore salutas kaj bonvenigas la gastojn en Graz kaj deziras, ke al ili plaĉu la urbo kaj ke ili ofte revenu.

Prez. **Steiner** tradukas ambaŭ paroladojn.

Danke respondas generalo **Bastien.**

16. de aŭgusto.

Je la 7 h diservo, celebrita de la kongrespartoprenanta **P. Poell** el Nederlando.

Poste rondveturado tra la bela urbo Graz sub gvidado de niaj klubanoj, poste al sur Schloßberg, kie en la restoracio sub libera ĉielo oni tagmanĝis je plena kontenteco.

Poste venis la tempo de adiaŭo kaj kun granda bedaŭro ni vidis forveturante niajn multajn amikojn."

E.-Soc. p. Stirio: Bartl.

Ni kore dankas al niaj senlacaj Graz-aj s-anoj por la vere modela akcepto kaj aranĝo de la amuzvespero, unuavice al kolonelo Hackl, Bartl, Rogler, Wallner kaj al ĉiuj aliaj. AEA

De Graz ni post bela veturado venis trans la nova Pack-ŝoseo al Klagenfurt je la 18 h.

„Sur la ĉefplaco kolektiĝis la per verdaj flagoj ornamitaj 10 aŭtomobiloj. Ili estis salutataj de nia vicprez. **Schmid.** Poste ni iris kelkajn paŝojn al la ĉefpoŝtoficejo, kie nia **urbestro komerca konsil. Wolf** salutis la gastojn per kortuŝaj vortoj:

‚Klagenfurt ĝojas, ke ĝi havas la okazon gastigi tiom da fremdaj gastoj el multaj landoj. Situita ĉe la limo de tri landoj ĝi vere komprenas la necesecon de Esperanto kaj nia urbo ĉe Lago de Wörth subtenas tial la pacamajn ideojn de Esperanto.

Estas honoro por mi, ke mi hodiaŭ nome de mia urbo povas alinomigi ĉi tiun straton kaj mi nun baptas ĝin kiel

Esperanto-straton.

Sentu vin bone ĉe ni kaj revenu baldaŭ!

Prez. Steiner tradukis, kaj generalo Bastien respondis per kortuŝaj vortoj de danko nome de UEA kaj de la ĉeestantaj s-anoj.

Poste la s-anoj iris en nian unikan Blazon-Salonegon kie la Landestro de Karintio, **ekscelenco feldmarŝalleŭtenanto von Hüllgerth** alparolis ilin, esprimante sian ĝojon pri la alveno de gastoj el diversaj landoj al Karintio kaj dezirante ke al ili plaĉu nia malgranda sed tamen pro siaj lagoj kaj neĝmontoj bela lando.

Sekvis komuna vespermanĝo en Deutsches Vereinsheim kaj kvinteto laŭ karinta maniero ludis originalajn kantojn.

17. de aŭgusto:

Ankaŭ ĉe la forveturo matene multa publiko ĉeestis, kiu povis informiĝi, ke tamen la homoj povis interparoli en una lingvo komuna.

Niaj klubanoj penadis helpi ĉiamaniere kaj ankaŭ sukcesis havigi al la partoprenantoj de Tra Aŭstrio loĝejojn malgraŭ la vere granda fremdulfrekvento. La estro de Verkehrsbureau klopodis multe, sed bedaŭre ne ĉiuj ĉambroj menditaj en la hoteloj estis je nia dispono."

E.-grupo: Otto Müller

Akceptu grupo en Klagenfurt kaj speciale s-anoj prez. Müller, vicprez. Schmid, sekr. Komposch kaj ĉiuj aliaj la koran dankon de ni ĉiuj.

AEA

Nia vojo kondukis nin tra belega pejzaĝoj al **Spittal a. D.,** kie ni vere bone tagmanĝis en Hotelo Post kaj poste daŭrigis al Großglockner.

La unua parto devis tranokti en la belega vilaĝo **Heiligenblut** en pitoreska situo, la dua en **Großglocknerhaus** kaj **Pasterzenhaus** kaj la lasta en la plej alte situita **Franz-Josefs-Haus** vid-al-vide de la grandioza Pasterzen-glaciejo kaj la pinto de Großglockner mem.

Oni bone vespermanĝis kaj la

18. de aŭgusto

daŭrigis la belegan, ravigan vojaĝon sur Großglockner-Altŝoseo ĝis Zell am See, kie en Hotelo Post okazis la lasta komuna tagmanĝo kun finparolaj vortoj de generalo Bastien, kiu dankis al prez. Steiner kaj liaj filoj pro la granda, peniga laboro, kiun ili havis dum la tuta vojaĝo, zorgi pri tiom da homoj.

Prez. Steiner respondis per dankaj vortoj kaj diris: „Estas vere malfacile aranĝi ek veturadon por societo en unu aŭtobuso dum la plej frekventata vojaĝsezono. Despli malfacile estas zorgi por 10 aŭtobusa societo. En ĉiu eĉ plej malgranda vojaĝsocieto ekzistas io, kio ne plaĉas al unu aŭ alia, despli multe povas okazi, se 240 personoj kune vojaĝas. Certe la loĝservo ne funkciis kiel ni deziris, sed pri tio ni ne kulpas, ĉar ni antaŭmendis pere de Oest. Verkehrsbureau la necesajn ĉambrojn. Ankaŭ Verkehrsbureau ne

ilpas, ĉar ĝi mendis la ĉambrojn, sed la telestroj ne ĉiam kaj ĉie plenumis tute n devon. Ni raportos pri tio al la oncerna instanco!

Ni vere bedaŭras, ke ĉi tiu malagrablaĵo, intencita kaj ne dezirita de ni, faris albonan impreson! Sed ni petas, omprenu, ke ni faris ĉion, kion ni povis i, kaj ni petas pardonon de tiuj, kiuj leris eĉ prave.

Sed nun pripensu, ke ni montris al vi almultekoste belegan pejzaĝon! Forgesu malagrablaĵojn kaj en viaj pensoj restu r la agrablaĵoj! Ĝis revido en Varsovio."

La franca karavano forveturis jam de ll hejmen per rapidtrajno sub la gvidado s-ro Petit, la **angla** sub gvidado de s-ro oldsmith el Salzburg, kien ni veturis de ll.

Ni alvenis je la 18 h en Salzburg kaj aŭtobuso daurigis sian vojon laŭ la ogramo antaŭe priskribita al Wien, kie alvenis la 21. de aŭg. posttagmeze.

Ni 26 personoj travivis tre agrablajn ojn en plena harmonio kaj kun danko partoprenantoj adiaŭis en Wien.

...Mi prenas la okazon por danki al Vi o la tre bone efektivigita vojaĝo post la ngreso tra Aŭstrio, mi vidis tre multon eresan kaj la semajno estis efektive tre bone izata per Via helpo..."

Anjo **Herzog**, Königinhof, ČSR.

...Mi ne povas forgesi la belegajn tagojn, itajn dum la kongreso en Wien, speciale la atraĵo ne estas forigebla el mia kapo..."

Josef **Kleiner**, Rustschuk, Bulgarujo.

...Mi sentas la devon danki vin pro la re belaj tagoj, kiujn ni pasigis en la gastama j rava Aŭstrio. Neniu pli ol ni italoj laŭerte konas la penadon, la klopodojn kaj la rgojn, kiujn postulas kongresorganizado kaj e vojaĝorganizado. La turismaj agentejoj cile povas aranĝi dek- aŭ dudek-personan ravanon, sed kiam oni multobligas ĉi tiujn merojn (kiel okazas dum kongresoj), kiam i devas prepari agrablan vojaĝadon al ntoj da homoj, tio estas per si mem andioza entrepreno kaj meritas senrezervajn ŭdojn.

Ni trairis vere plaĉan, vere belan tempon en a lando: ni vidis admiregindajn pejzaĝojn j ĉeestis brilajn festojn; kaj tiuj ĉi memorjoj restos longe, longe en ni. Pro tio ni idas al vi sinceran dankon, al vi kaj al iuj viaj kunlaborintoj. Estu certa, ke, se io ojnis iel malpli sukcesa ol la cetera, tio estas te forgesita, kaj survivas en nia memoro nur belo, la revidindaĵoj, la ĉarmo de la kongresvojaĝo kaj -aranĝoj."

Clelia **Guglielminetti**, Torino.

...ne ĉiuj partoprenintoj estas sendankaj. utkorajn dankojn pro viaj superhomaj laboroj or la sukceso de la kongreso kaj de la postongresa ekskurso..."

J. Ravestein, s' Gravenhage.

„Dezirante al vi ĉiun sukceson en via senlaca oresperanta laboro kore premas vian manon.

Gaetano Facchi, Brescia."

„Ni sendas la novan serion de poŝtmarkoj iel malgrandan esprimon de danko por la randa laboro, kiu ebligis nin ĝui tiel belan ertempon..." **Ges. Jackson**, Willaston.

„... permesu, ke mi s-ro kortega konilisto esprimu miajn admiron kaj dankon por a grandioza laboro, kiun vi faris por la tiel ela kaj sukcesplena okazigo de la 28-a..."

P. Franz Meŝtan, Krems.

Kongres-filmo.

La 16. sept. en Haga Amatora Filmklubo a loka del. s-ro J. Ravestein Jr. montris an novan filmon „Tra Aŭstrio" al ĝiaj membroj, tradukante la E. tekstojn. La

Radio-Wien.

E.-kurso ekde 2. nov. ĉiulunde de 15 h 40—16 h.

Informoj por la eksterlando okazos ĉiun 2. kaj 4. vendredon je 22 h 40 ekde 13. novembro.

Radio-Wien disaŭdigis dum 28-a ankaŭ la Inaŭguron kaj paroligis 28 naciojn. Koran dankon!

E.-Librovendejoj en Wien:
Rud. Foltanek, I., Herrengasse 2.
R. Lechner, I., Graben.

---

16 mm filmo, kiu vidigas la vojaĝon tra Innsbruck — Zell am See — Wien (kun multaj kongresaj bildoj), daŭrige per la postkongresa ekskurso al Graz—Klagenfurt—Großglockner kaj returnen tra Tirolo. Post la duonhora prezentado, kiu rikoltis multan aplaŭdon, la ĉeestantaro petis informon pri Esp. kaj la bela Aŭstrio.

Ni kore gratulas al nia amiko Ravestein kaj dankas nome de Aŭstrio kaj de la kongreso. Raporton ni faris al nia kanceliero kaj al ministro Stockinger. Ni vere ĝojus vidi ankaŭ en Aŭstrio nian kongres-filmon!

Al la Landaj Asocioj

Tre Estimataj Samideanoj. Vi scias, ke nesufiĉa progresado de nia movado post prekaŭ 50 jaroj, kaj kritikinda administrado de UEA, kiu formanĝis senprofite la gravajn donacitajn monrezervojn, incitis la Landajn Asociojn ludi efektivan rolon en nia Centra Asocio. La malnova konflikto pliakriĝis inter tiuj, kiuj volis, ke UEA restu **nura grupiĝo** de izoluloj, kaj tiuj, kiuj insistis, ke UEA esence **fariĝu ligilo inter la Asocioj,** kaj, sekve, **impulsa centro de la propagando** sur la internacia kampo.

En 1933, post dumjaraj diskutoj, UEA, kiu sidis en tre danĝera situacio laŭ financa vidpunkto, fine akceptis kunlaboradon de la Landaj Asocioj (Interkonsento de Kolonjo), esperante, ke ili dank' al siaj membroj alportos financan helpon. Sed la nova statuto zorge konservis la principon de la unuopa membreco. La Landaj Asocioj aligis siajn simplajn membrojn, sed ne estis membroj de UEA. Ili elektas komitatanojn por tri jaroj, sed havas neniun rajton en la gvidado, eĉ okaze de ĝenerala voĉdonado por gravaj problemoj.

La principa akordiĝo en Kolonjo ĉesigis — provizore — multjaran diskutadon, en kiu bedaŭrinde enmiksiĝis pripersonaj atakoj, kaj en 1934 la nova statuto estis voĉdonita kaj aprobita. Laŭirante ni rimarku, ke tiu ĝenerala voĉdonado okazis sen antaŭa publika diskuto en nia revuo, kvankam la **tiama Direktoro nun riproĉas,** ke ni ne malfermis tian publikan diskutadon antaŭ ol voĉdonigi pri **unu punkto** de la statuto. Kelkaj Landaj Asocioj (ekz. la franca) protestis, ke la nova statuto ne lasas al ili sufiĉe gravan rolon. Sed, ĉar oni tiam devigis ilin respondi „jes" aŭ „ne", ili respondis jese, por ne malesti en la nova organizo.

Dum la Stockholma Kongreso (1934), la novaj komitatanoj, elektitaj de la Landaj Asocioj, volis renovigi la Estraron kaj parton de la Komitato; tio okazigis eksiĝon de la ĝistiamaj Prezidanto (S-ro Stettler) kaj Direktoro (S-ro Jakob), kaj gravajn ŝanĝojn en la gvidantaro.

Diversaj cirkuleroj al la Komitato raportis pri la renkontitaj malfacilaĵoj, ankoraŭ pli gravaj ol ni pensis. Fine aperis necese, ke oni alprenu radikalajn rimedojn: **vi aprobis translokigon de nia Centra Oficejo al Londono.** Tiu decido aspektis **ne nur necesa,** sed **urĝa.** Mi jam klarigis, ke nun ni devas vivi el niaj ĉiujaraj rimedoj; kaj ke **en Ĝenevo ni ne povas vivi** kaj propagandi, tion montris unujara sperto.

Grupo da Svisoj sin turnis al **Ĝeneva Tribunalo,** postulante voĉdonadon de la Delegitoj. Estas vere, ke laŭ la statuto ŝanĝo en la statuto estas findecidata de ĝenerala voĉdonado de la Delegitoj; tamen oni estis rajtinta esperi ke, por **ne perdi valoran tempon** per diskutoj, neniu postulos tiun formalaĵon. Post la protesto, la Prezidanto tuj voĉdonigis la Delegitojn, kiuj per **granda plimulto (80%) akceptis** la proponon.

Pro tio, ĉiu atendis baldaŭan solvon de la problemo kaj komencon de la vere necesa laboro de la centra oficejo.

Bedaŭrinde la svisaj protestintoj rifuzis akcepti la rezulton kaj ĉesigi la leĝan proceson, kiu malhelpas la translokigon kaj aldonas altajn kostojn al la jam suferanta budĝeto de nia organizo. Por pravigi tiun agon, ili prezentas ses kritikojn: — Oni sendis **aerpoŝte** bultenojn al kelkaj malproksimaj landoj; la cirkulero al la delegitoj estis subskribita de la Prezidanto, sed ne de la Direktoro, k. t. p. Sed la unua kritiko estis, ke la Prezidanto ne formale voĉdonigis la Komitaton pri okazigo de la delegita voĉdonado. Tio estas vera, ĉar ekzistis jam antaŭe voĉdono de la Komitato por translokigi al Londono. Neniu bonvola homo pretendos, ke estis necese revoĉdonigi ĝin kaj malŝpari ankoraŭ kelkajn monatojn kun la koncernaj altaj elspezoj por nur **formala** aprobo de la delegita voĉdonado pri aliigo de la statuto, kiu estas la sekvo de la aprobo jam donita. Kaj kion tia dua voĉdono de la komitato estus ŝanĝinta en la rezultato?

Post la **4-a de Julio** la Prezidanto traktis kun la protestintoj, kaj dum la unuaj tagoj de la Viena Kongreso ŝajne estis espero pri akordiĝo. Je la **14-a de Aŭgusto** li ricevis leteron de S-ro Bouvier, kiu malaperigis tiun esperon kaj montris, ke la protestintoj estas decidintaj konduki la **proceson ĝis la fino.** Laŭ la kalkulo de la komitato tiu certe daŭrus **minimume sep monatojn,** kaj laŭ la advokato, eĉ **pli ol unu jaron.** U. E. A. **ne plu posedas sufiĉe da mono** por elteni dum tiom da tempo, ĉar **intertempe ĝi povus preskaŭ nenion fari.** La protestintoj per leĝa proceso **malebligas la funkciadon en Londono,** kaj **ankaŭ malpermesas,** ke la elektita Direktoro laboru en Ĝenevo, dirante ke li estis elektita nur por Londono. Fakte, do, tio **signifas la morton de U. E. A.** Pro tio, la **komitatanoj en Vieno,** kun granda bedaŭro, **unuanime akceptis** la ĉi-kunan rezolucion.

Post la Kongreso la Prezidanto vizitis S-ron Stettler, kiu diris, ke li tute ne enmiksiĝis en la ĝeneva proceso. Li vizitis S-ron Bouvier, kiu promesis paroli kun siaj amikoj, kaj doni respondon je la fino de Aŭgusto. La respondo alvenis, kaj denove montris, ke ili **ne volas ĉesigi la proceson.**

Tio montras, ke **kelkaj malmultaj personoj** tute **ne volas akcepti** la deziron de la **granda plimulto,** sed volas **devigi** la komitaton resti en Ĝenevo, kvankam ĝi bone scias, ke tiu estas **finance neebla.** La

komitatanoj, opiniante ke forta internacia organizo, kiu volas kaj povas labori en la intereso de la Movado, estas pli grava ol iu nomo, decidis starigi novan organizon sub la nomo **INTERNACIA ESPERANTO-LIGO.** Ili atendas la subtenon de ĉiu Esperantisto, kiu deziras unuecon kaj bonan laboron.

Protokolo de Kunsido de UEA.-Komitato en Vieno je la 15-a de aŭgusto 1936.

Ĉeestis: La Prezidanto (Gen. L. Bastien), P. W. Baas (Nederlando), O. Bujwid (Polujo), I. R. G. Isbrücker (Nederlando), P. Kempeneers (Belgujo), E. Malmgren (Svedujo), A. C. Oliver (Britujo), P. Petit (Francujo), kaj I. R. Scherer (Usono).

La ĉeestantaj Komitatanoj de UEA., post lego: de la leteroj de S-ro Bouvier, de la 30-a de julio 1936 kaj 13. de aŭgusto, konsiderante, ke tiu decido de la protestintoj malhelpos la translokigon de la oficejo de UEA. al Londono dum pluraj monatoj; ke tio **igas neebla la komencon de la laboro** por la venonta jaro kaj eĉ ĉiun seriozan taskon **dum pluraj monatoj;** ke en la nunaj cirkonstancoj tio signifas la **morton de UEA.** komisias sian Prezidanton por fari tuj ĉe S-ro Stettler kaj ĉe la protestintoj lastan klopodon, por ke tiuj ĉi rezignu sian agadon kaj por **eviti la baldaŭ timotan katastrofon.**

En okazo de malsukceso aŭ de netuja sukceso decidas, ke la **Landaj Asocioj,** respektive la Komitatanoj, estos petitaj, ke ili **tuj eksiĝu el UEA.** kaj **fondu novan Asocion,** sidantan en Londono, ne akceptas la eksiĝon de S-ro Goldsmith kiel Direktoro, kaj decidas, ke li estos proponita kiel Ĝenerala Sekretario de la nova asocio.

Komisias sian Prezidanton kaj sian Direktoron por pristudi post konsiliĝo kun juristoj, la demandojn, kiujn sekvigas tiu rezolucio, provizora statuto, forlaso de la posedaĵo de UEA., k. t. p.

Pri la nuna Proceso: En la dirita okazo de malsukceso, decidas, ke la proceso, kiu ne plu interesos la novan Asocion, estos forlasita, post konsiliĝo kun juristoj.

Laŭ peto de Generalo Bastien, nia provizora Prezidanto, mi donas ĉi-kune kelkajn praktikajn sciigojn. La oficejo jam funkcias, kaj vi povas esti certa, ke ĉi tie ni faros ĉion eblan por certigi ke I. E. L. estu internacia organizo vivkapabla ĉiurilate. Ni devas nun ne nur pensi pri pasintaj sukcesoj, sed ankaŭ agi por havigi estontan helpon al **ĉiu Asocio kaj individua Membro.**

AL LA KOMITATANOJ. Ni petas, ke ĉiu, kiu estas preta kunlabori, sendu al **mi** sian eksiĝon el U. E. A., kaj samtempe sur aparta folio, leteron akceptanta provizoran oficon en I. E. L. La provizora estraro kaj komitato estos tiuj nunaj membroj de la U. E. A. — estraro kaj komitato kiuj estos farintaj tion.

AL LA LANDAJ ASOCIOJ. Ni faras la saman peton. Kiel eble plej baldaŭ ni pretigos novan mallongan statuton, kaj sendos ĝin al vi por aprobo. La kotizo por la simplaj membroj estos po 0.50 angla ŝilingo, tio estas, iom malpli ol la ĝisnuna 0.50 sv. fr. Brita Esperantista Asocio jam decidis aliĝi al I. E. L., kaj la brita ĉefdelegito estas S-ro Fred Wadham, antaŭe ĉefdelegito de U. E. A.

AL LA ĈEFDELEGITOJ. Se vi estas preta kunlabori kun ni, bonvolu sendi al mi apartan leteron kun via eksiĝo el U. E. A. kaj plenigi la kunsendatan formulon. Mi petas rapidan decidon, ĉar estas nepre necese, ke ni aperigu la venontjaran jarlibron en la frua printempo, laŭ promeso.

ASOCIA JARO. De 1. Januaro ĝis 31. Decembro, sed en la unua jaro, estos de la dato de la starigo ĝis la fino de 1937, kaj tiuj personoj kiuj aliĝas nun estos membroj por tiu periodo.

KOTIZOJ. Tiuj ĉi estas jam fiksitaj por la diversaj landoj, kaj folietoj laŭ la kunsendata modelo estos sendataj al Landaj Asocioj kaj Ĉefdelegitoj post ricevo de aliĝo laŭ la ĉi-supra peto.

DELEGITOJ. En tiuj landoj kies Landaj Asocioj aliĝas al I. E. L., ni faros la necesajn aranĝojn **pere de la L. A. aŭ ĈD.** En aliaj landoj la C. O. faros la necesajn aranĝojn.

BONA NOVAJO. Esperantistaj geedzoj en Anglujo ĵus donacis al ni belegan domon apud Londono, kiel Asocian sidejon. Ĝi estas sufiĉe granda por enhavi la oficejon, mian hejmon (por kiu, kompreneble, mi pagos la kutiman lupagon) kaj eĉ jam de la komenco almenaŭ unu gastĉambron. Ĉirkaŭ ĝi estas grand belega ĝardeno, en parto de kiu ni povo pli poste, se dezirate, konstrui alia ĉambrojn. La valoro de la posedaĵo est minumume Dollar 1,500 (22.500 sv. f Rezulte, oni povas kalkuli, ke la jara kos por nia oficejo estonte estos ne pli 1,000 sv. fr. kontraŭ 3,433 en Ĝenevo 1935. Alia bonfarulo promesis pagi imposton rilate al la transdono. Al ĉi tri, ni ŝuldas tre koran dankon.

Tio estas bona komenco, sed nur komenco. Per la aktiva kunagado de ĉiu, kiu ni sendas ĉi tiun leteron, mi estas tut certa, ke nia internacia organizo t baldaŭ estos pli forta, pli vigla kaj utila al la Movado, **ol iam antaŭe.**

Por ke ni ricevu la konfidon de ĉi Esperantisto, ni devas montri vivon, ka ne nur kolekti kotizojn. **Frua** apero de **Jarlibro** estos la plej bona pruvilo al individuo, kaj tio povos okazi nur se ĉiu, al kiu ni sendas la nunan cirkuleron, senprokraste respondos.

Ni atendas, do, vian decidon kaj helpon.

Kun samideana saluto,

Cecil C. Goldsmith, Ĝenerala Sekretario.

Aŭstria E.-Asocio en sia komitat-kunsid la 26. de septembro unuanime post longa kaj detala priparolo de la situacio decidis

eksiĝi el UEA kaj
aliĝi al Internacia Esperanto-Ligo.

Por AEA: Steiner, d-ro Höfer.

Mi sekvis la ekzemplon de AEA. Al delegitoj eliras detala skriba informo.

Ĉefdel. aŭstria: G. Weber.

Intern. Esperanto-Muzeo en Wien
I., Neue Burg

Novaj dumvivaj membroj: s-ino Gerarda de **Waart, Hilversum;** s-ino **Jakob,** Thouan.

Donacis: F-ino **Bloemendal** kaj **Tetterode** el Lochem po ŝ 2.50, s-ro **Pastro** R. W. F. Kyltenbelt, Utrecht ŝ 10.—.

„Freude durch Esperanto“,
la lernlibro por la
Esperanto-Radio-kurso-Wien.

Vizitu en **Vieno** la unuan **„Tischgrill-Restoracion zum Kühfuss“,** Wien, I. Graben 20 (I. Naglergasse 1), kie vi mem povas rostigi vian viandon elektre sur via manĝotablo.

En la
Restoracio de Fortikaĵo Hohensalzburg
la ekskursanoj de 28-a je la 6. de aŭgusto posttagmeze trinkis kafon kaj ĝuis, dum la sunradioj brilis, la belegan panoramon al Salzburg kaj ĉirkaŭaĵo.

La granda, ombra ĝardeno de
Stieglkeller en Salzburg
ĉiam memorigos la ekskursanojn pri bonaj manĝo kaj biero, sed speciale pri la Hejmeca Vespero, aranĝita de Lando Salzburg.

Ĉe la salut-vespero en la ĝarden-restoracio
Sternbräu en Salzburg
la kongresanoj ekkonis la bonkorecon de niaj Salzburgaj samideanoj. Bonaj manĝaĵoj estis menciitaj sur la manĝokarto en Esperanto.

En restoracio
TISCHLER
Wien, I. Schauflergasse 6
multaj samideanoj dum la kongreso spertis ĉiutage la faman Vienan kuirarton. Kunvenejo de **Esperanto-Klubo,** ĉiumarde de 18 h 30 bis 22 h.

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist"

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des **Oesterreichischen Esperanto-Bundes**

Nr. 13 September/Oktober 1936

Für Oesterreich jährlich mit Postzusendung, nur zu fünf Stück, S 2.50 in Briefmarken. — Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-12.826

An die Mitglieder unseres Bundes!

Jedes Mitglied erhält elfmal jährlich die „Zweite Sprache für Alle" als Nachrichtenblatt, aus dem er stets über neue Erfolge und unsere Bewegung informiert wird, dessen Inhalt er aber auch für seine Propaganda in Zeitungen und Bekanntenkreisen benützen möge. Bei Weitergabe an Zeitungen mögen diese stets die Quelle angeben.

Die Bezieher des „Oest. Esperantist" erhalten als Mitglieder der AEA ebenfalls die „Zweite Sprache" und wollen sie dieses Blatt als Propaganda an Persönlichkeiten weitergeben oder in Gast- und Kaffeehäusern auflegen.

Für Propaganda werden Abonnements auf nur fünf Stück aufwärts angenommen. Fünf Stück S 2.50 jährlich in Briefmarken, vorher einzusenden! Für die restlichen drei Nummern 1936 S —.70.

Esperanto — in Deutschland nicht verboten! Wie der Oesterreichische Esperanto-Bund von zuständiger Stelle aus Deutschland erfährt, ist: „Esperanto in Deutschland nicht verboten. Es kann in Wort und Schrift auch weiterhin verwendet werden. Selbstverständliche Voraussetzung ist dabei nur, daß es auch fernerhin in keiner Weise in den Dienst von Gedanken und Bestrebungen gestellt wird, die irgendwelchen deutschen Belangen abträglich sind. Auch der neutrale grüne Esperantostern kann weiter getragen werden."

Esperantokurse bei der Post- und Telegraphendirektion in Wien. Mit Zahl 129.303/1936 fordert die Post- und Telegraphendirektion Wien ihre Bediensteten auf, an Esperantokursen teilzunehmen, die für Anfänger am 12., bezw. 13. Oktober beginnen (jede Woche abwechselnd Montag und Dienstag) und für Fortgeschrittene am 14., bezw. 15. Oktober (abwechselnd Mittwoch und Donnerstag) in einem Lehrsaale des Postlehrkurses, Wien, I., Postgasse 17/III/293. Anmeldungen an Oesterr. Esperanto-Bund, Wien, I., Neue Burg. Da die Erlernung des Esperanto durch Post- und Telegraphenbedienstete im Hinblick auf dessen Verbreitung im besonderen Interesse des Dienstes liegt, ergeht an die Bediensteten die Aufforderung, sich in möglichst großer Anzahl an diesen Kursen zu beteiligen.

Esperanto auf der Wiener Messe: Die Messeleitung hat mit Rücksicht auf die Werbetätigkeit des Oesterreichischen Esperanto-Bundes diesem in der Herbstmesse je einen Standplatz im Messepalast und in der Rotunde kostenlos zur Verfügung gestellt und es wurden viele tausend Einladungen für Esperantokurse verteilt. Der Lautsprecher auf dem Terrain vor der Rotunde verkündete mehrmals täglich, daß der Esperanto-Bund Kurse abhalten wird und für solche warb auch das Messekino im Messepalast, das ein Bild von der Kongreßeröffnung in dem Festsaale der Hofburg mit Vizekanzler Baar und Minister Stockinger ebenso wie die Einladung zu Kursen anzeigte.

Um allen, die keinen Esperantokurs besuchen können, dennoch die Gelegenheit zur Erlernung des Esperanto zu geben, beginnt mit 3. **November** ein

schriftlicher Esperantokurs

in **30 Wochenbriefen.**

Kosten des ganzen Kurses **S 3.50**, einzusenden **im vorhinein**, auch in Briefmarken, an Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg.

Esperanto-Theater.

Der großartige Erfolg der Esperanto-Uraufführung „Das weiße Rössel" hat uns bewogen, in diesem Winter in Wien

3 Theateraufführungen in Esperanto

von Kräften, die im „Weißen Rössel" mitgewirkt haben, zu veranstalten.

Es gelangen zur Aufführung:

1. Samstag im Dezember 1936:

Die Einakter:

„Frühere Verhältnisse", Posse von Nestroy.
„Ein Heiratsantrag", Posse von Tschechow.
„Brüderlein fein", Alt-Wiener Singspiel mit Musik, von Leo Fall.

1. Samstag im Februar 1937:

„Straßenmusik", Erfolgstück mit Gesang, von Schurek.

1. Samstag im April 1937:

„Meine Schwester und ich", musikalisches Spiel in 4 Bildern mit Musik, von Ralph Benatzky.

Preise der Sitze S 1.—, 2.—, 3.—. Da die Sitzzahl auf 350 beschränkt ist, wird empfohlen, sich die Plätze **möglichst bald zu sichern. Sofortige** Bestellung von Plätzen für alle drei Vorstellungen, **sichert** Ihnen den von Ihnen **gewählten** Platz für alle Vorstellungen!

Das Ensemble soll auch Gastspiele in den Hauptstädten unserer Bundesländer und im nahen Auslande absolvieren.

Bei günstigem Erfolge wird dieser Theaterdienst für das nächste Jahr weiter ausgebaut werden.

Wir erwarten möglichst bald Ihre Bestellungen! AEA.

Brasilien In der Stadtbibliothek von Rio de Janeiro wurde eine Esperanto-Abteilung geschaffen.

Frankreich. Die Stadt Vire versendet Verschlußmarken in Französisch und Esperanto.

Lettland. Das Organ der lettischen Postler bringt eine Esperanto-Rubrik.

Liechtenstein. Das schöne Fürstentum Liechtenstein hat schöne Esperanto-Führer zur Ausgabe gebracht. Zu bestellen bei Regierung Liechtenstein in Vaduz.

Polen. Die Pfadfinderzeitung „Skaut" in Lemberg veröffentlicht regelmäßig Artikel über Esperanto.

Tschechoslowakei. Die Tramdirektion in Pilsen hat über Vorschlag des Reisebüros Kosmos auf ihre Fahrscheine einen Propagandatext in Esperanto drucken lassen.

Oesterreich. Während der Kongreßfahrt durch Oesterreich wurde in Anwesenheit von über 300 Esperantisten aus den verschiedensten Ländern durch Bürgermeister Kommerzialrat Wolf eine „Esperanto-Straße" eröffnet. In derselben befindet sich die Hauptpost.

Oesterreich. Land Kärnten und Stadt Klagenfurt haben Esperanto-Führer herausgegeben.

Oesterreich. Die Generaldirektion für die Post- und Telegraphenverwaltung in Wien hat die unterstellten Post- und Telegraphendirektionen eingeladen, behufs Förderung der **im Dienstinteresse gelegenen Erlernung des Esperanto** durch die Bediensteten sich wegen Abhaltung von Esperantokursen mit dem Oesterreichischen Esperanto-Bund und dessen am Sitze der Direktionen gelegenen Gruppen ins Einvernehmen zu setzen.

Vöcklabruck. Die Esperanto-Runde unter Leitung der s-anino Fohler konnte die 1. Jahreswiederkehr ihres Bestandes feiern. Als Jubiläumsgabe erhielt die Gruppe ein „argenta libro" für Gäste. 5 Ausländer besuchten die Runde. 60% der Mitglieder waren beim Esp.-Weltkongreß in Wien anwesend. Beispielgebend! Linzer Tagblatt berichtete darüber.

Welser Volksfest. In den schönen Prospekten war auch Esperantotext. Unter den Ausstellern hat die Musikinstrumentenfirma F. Moser gleichzeitig für Esperanto geworben.

Esperanto-Lektorat an der Technischen Hochschule in Wien beginnt das Wintersemester 1936/37 am 23. Oktober um 12 Uhr, Lehrsaal III.

Wien: Esperanto-Klub hält jeden **Dienstag** seine Vereinsabende in seinem Heim im Restaurant Tischler, **I., Schauflergasse** 6 (keine Konsumation!) ab. **18 h 30 bis 20 h Esperantokurs,** beginnend am **6. Oktober;** von 20 h Vorträge, dann Gesang und Unterhaltung. — 13. Oktober: **Max Rud. Frey** über seine Reise mit Rad nach Holland; 20. Oktober: **W. Rentmeister** über die Olympiade in Berlin. — Weitere Vorträge in Vorbereitung.

Wien. Unsere Wiener Esp.-Gruppen werden in diesem Winter 3 großzügige **Unterhaltungsabende** veranstalten. **14. November** einen **„polnischen Abend"** zur Werbung für den Kongreß nach Warschau; **9. Januar** einen **„tschechischen Abend"** mit Tanz; **12. März** einen **„italienischen oder ungarischen Abend".**

Interessenten wenden sich an Oest. Esp.-Bund, Neue Burg (Tel. R-27-803).

Wien. Viena E.-Unio (angeschlossen der AEA) veranstaltet Kurse bei der Gewerkschaft der Arbeiter im Hotel-, Gast-

und Schankgewerbe, IV., Treitlgasse 3, und bei der Kalocsay-Gruppe, IX., Löblichgasse 3, nach der Cseh-Methode mit je 40 Teilnehmern. Lehrerin: Maria Adamkowa aus Bohumin, CSR.

Wien. Katholischer E.-Verein (KUE.) hielt am 13. August in der Kalasantiner-Kongregation eine Zusammenkunft ab, bei der Präsident Chiba besonders den Legationssekretär der chinesischen Gesandtschaft, Herrn Lui, Präsident Heilker der IKUE., Pfarrer Poell, Bruder Villanova u. a. begrüßte. P. Dr. Kao O. F. M. aus China hielt einen schönen Lichtbildervortrag über seine Heimat.

Der **„Oesterreichische Esperanto-Bund"**, Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803), veranstaltet **Esperantoanfängerkurse.**

Beginn am Dienstag, den 3. November, wöchentlich einmal 19—21 h in den Schulen:

I., Renngasse 20, am **Montag**; **III.**, Sechskrügelgasse 11, am Dienstag; **VII.**, Neubaugasse 42, am Freitag; **VIII.**, Zeltgasse 7, am Dienstag; **IX.**, Grüne-Tor-Gasse 9, am Montag; **X.**, Erlachgasse 91, am Freitag; **XIII.**, Märzstraße 70 (Knaben), am Mittwoch; **XVII.**, Geblergasse 31 (Knaben), am Donnerstag; **XVIII.**, Schulgasse 57, am Dienstag; **XXI.**, Donaufelderstraße 20, am Montag.

Dauer der Kurse: 4 Monate. **Kursbeitrag:** S 10.—; Arbeitslose: S 5.—; Schüler S 4.—. Anmeldung mündlich, schriftlich oder telephonisch an **Oesterreichischer Esperanto-Bund,** Wien, I., Neue Burg, Heldenplatz.

Werben Sie eifrig mit! Sie erhalten für je fünf neu geworbene Kursteilnehmer einen Kursfreiplatz nach Wahl für sich oder für Ihre Bekannten.

„Reichspost" veröffentlicht ab 4. Oktober allsonntags einen Esperantokurs.

„Das Kleine Volksblatt" veröffentlicht, beginnend mit 11. Oktober, ebenfalls in der Sonntagsbeilage einen Esperantokurs.

Hauptversammlung des Oesterreichischen Esperanto-Bundes.

Am 14. August um 16 Uhr eröffnete Präsident Hofrat Steiner, begrüßte und skizzierte die in den drei Jahren der letzten Funktionsperiode erzielten Erfolge, die es auch ermöglichten, den 28. Esperanto-Weltkongreß in Wien abzuhalten.

Den Kassenbericht erstattete Herr Werner.

Nach erfolgter Entlastung berichtete Präsident Steiner über die Schaffung einer „silbernen Ehrennadel" des Bundes an verdienstvolle Mitarbeiter. Mit Beifall wurden vom Ausschusse folgende Personen für diese Ehrung vorgeschlagen: Wien: Direktor Schamanek, Frau Multrus, Rechnungsrat R. M. Frey, Hofrat Dr. Wollmann; Generalstabsarzt d. R. Dr. Dietl (Baden); Provinzial P. Fr. Mestan (Krems); Dir. Karl Wannek (Linz); Oberbeamter Karl Franz (Wels); Beamter Bartl, Oberst Hackl, Univ.-Prof. d. R. Dr. Wladimir Köppen, Inspektor d. R. Lossos (Graz); Beamter Wil. Rogler (Köllach); Schulrat i. R. Fr. Schöpfer (Voitsberg); städt. Beamter Otto Müller (Klagenfurt); Prof. Dr. Fr. Christanell und Rudolf v. Lidl (Salzburg); Herr Kühbacher (Innsbruck); außerdem ausnahmsweise ein Ausländer, Herr Buenting aus Niederländisch-Indien, der seit zwei Jahren in Tirol in selbstlosester Weise Esperanto-Kurse hält. Präsident Steiner schlägt ferner folgende Ausschußmitglieder vor: Vizepräsident Sektionschef Doktor Fr. Uebelhör, Redakteur Nik. Hovorka und Beamten Werner. Präsident Müller (Klagenfurt) wünscht das Ehrenzeichen für Präsidenten Steiner. Alle Vorschläge einstimmig angenommen.

Zum Punkte Neuwahlen erklärt Präsident Steiner, keine solche mehr annehmen zu wollen, weil gewisse Einflüsse von auswärts ihm nicht passen. Eine Reihe von Rednern bat den Präsidenten, dennoch die Wahl anzunehmen. Nach langer Debatte entschloß sich Hofrat Steiner diesem Drängen nachzugeben, aber nicht für eine volle Funktionsperiode von drei Jahren, sondern bloß für ein Jahr. In geheimer Wahl wurde Hofrat Steiner mit 179 gegen 2 Stimmen (4 ungültig) wiedergewählt. Stürmischer Beifall.

Die **neue Leitung:** Präsident Hofrat Steiner, Vizepräsident Sektionschef Dr. Uebelhör, Rechnungsrat Rud. M. Frey, Kassier Werner, Generalsekr. Bahnrat i. R. Dr. Max Höfer, Sekr. Hochschüler Kreutel, Zeitungsdienst und Propaganda Postbeamter Ulbrich, Auslandpresse Dr. E. Pfeffer, Unterricht Reg.-Rat Fr. Stengel und Fachlehrer Drößler, ferner Beamter Bernfeld und Hochschüler Max Rud. Frey. Dr. Höfer, Generalsekr.

Lehrersektion der AEA.

Die Lehrersektion hat ihre Tätigkeit bereits mit der Einrichtung von Esperantokursen begonnen. Derselben sind bereits 54 Personen angeschlossen.

Wir laden nun alle s-anoj ein, beizutreten, ob sie nun a) Berufslehrer mit Esperantolehrerprüfung (ELP), b) Nichtberufslehrer mit ELP, c) Kursleiter ohne ELP sind. Mitgliedschaft bei der AEA (Jahresbeitrag S 2.—) genügt, keine weiteren Kosten.

Stengel, Drößler.

Estrar-kunsido la 27. aŭg.

Ĉeestis: prez. Steiner kaj Bernfeld, d-ro Höfer- d-ro Pfeffer, Ulbrich, Werner; la aliaj estas ankoraŭ for je libertempo.

Temo: Propagando dum Viena Foiro kaj preparoj al la propagando por la aŭtunaj E.-kursoj por bone eluzi la ŝancojn de la 28-a.

2. Estrarkunsido de AEA. la 26. 9.

La plej grava demando estis pri eksiĝo el UEA kaj aliĝo al IEL, kiu post detala kaj tre serioza pritrakto estis decidita. (Vidu la detalan raporton en AE 9/10.

Aranĝo de kursoj en 10 lernejoj; pritraktado koncerne kursojn ĉe kuracistoj kaj inĝenieroj. La koncernaj fakgazetoj publikigis artikolojn kaj invitis al kursoj.

Aranĝo de teatrovesperoj dum ĉi tiu sezono en Vieno, ne nur por amuzi la s-anojn, sed ankaŭ propagandcele.

Laŭ decido oni presigis 50.000 ekzemplerojn de kursinvitilo germanlingva kun la titolo „Esp. malfermas al vi la mondon" kaj 1000 grandajn afiŝojn. Tiaj invitiloj estas haveblaj por 40 g po 100 kaj la afiŝoj po 7 g kaj afranko.

Krome AEA eldonis leterpaperon kun la titolo de la organizo, uzebla por ĉiu E.-grupo aldonate sian stampon (prezo po 100 S 1). kaj kovertojn kun propaganda teksto germanlingva (po 100 S 1.50) plus afranko.

AEA: Steiner, d-ro Höfer.

Kunveno en Esp.-Klub Wien

La 22. 9. kunvenis 100 s-anoj en la kunvenejo de E.-Klub por priparoli la gravajn taskojn, nun efektivigotajn. En plena harmonio kaj detale la diversaj demandoi estis pritraktitaj kaj nun estos farotaj.

Katholischer Schulverein, VIII., Piaristengymnasium: merkrede 19 h 20—21 h (komencantoj), 17 h 30—19 h (progresintoj).

Kurse: Lehrerhausverein, VIII., Josefsgasse, für Lehrer. **Wiener Urania**, 14 Kurse für Jung-Urania (besondere Flugblätter laden Jugend und Eltern hiezu ein).

Sekreta kons. d-ro Köppen 90-jara.

Li naskiĝis en St. Petersburg, studis tie, en Heidelberg kaj Leipzig.

E.-propagandisto li estas depost 1908.

Liaj sciencaj meritoj — li vivas depost 1924 en Graz — havigis al li trioblan doktorecon „Honoris causa" en 1908 de Dorpat (nun Tartu en Estonujo), 1920 de Hamburg kaj Graz.

AEA distingis lin dum la ĉi-jara mondkongreso per la novkreita „arĝenta honor-pinglo".

La plej korajn bondezirojn por la bonfarto de nia nestoro esprimas

Esp.-Societo p. Stirio. AEA, IEMW, AE.

Gazetservo de AEA.

La gazetservo nun ekfunkcios. Ĝi zorgos por almenaŭ unufoja livero de artikoloj por la gazetaro. Skribu al ni, kiuj gravaj gazetoj en via loko estu liverotaj; vi mem laŭ la notetoj en AE liveru al ili kaj ĉefe kolektu la aperintajn artikolojn kaj sendu ilin monate al ni. Helpu! AEA: Ulbrich.

Vortareto Germana-Esperanto.

En la **eldonejo Dürer-Verlag, Wien, VII.**, Bandgasse 28, ĵus aperas 36-paĝa vortareto, verkita de d-ro E. Pfeffer, samgranda kiel la E.-ŝlosilo. La prezo estas 10 g por aŭstrianoj, sed oni **nur** forvendas almenaŭ **po 10** je S 1.— afrankite, **100** je S 9.— afrankite, sed **nur kontraŭ antaŭa alsendo** de la koncerna mono.

E.-ŝlosilo germana, 4. eldono aperos baldaŭ en la sama eldonejo (11.—15. miloj). la **samaj kondiĉoj. La eldonejo petas diskonigi, ke sen antaŭa mono forsendo ne estas ebla.**

Deziras korespondi:

Bulgarujo: D. Ivanov, Plovdiv, str. Drin 4.

Aŭstrio: Kortega kons. Steiner, Wien, I., Neue Burg, interŝangi poŝtm. kun Portugalujo, Italujo, Hispanujo, USSR, Rumanujo Kolonioj. Preferas sendadon aerpoŝte kaj pm. bonfaremajn, jubileajn, aerpoŝtajn. Sendas ankaŭ rekompence la aŭstrian E.-gazeton Aŭstria Esperantisto kaj diversajn gvidfoliojn E.-lingvajn.

Svedujo: J. Lindström, Ramstösabrunn, fervojisto kun samfakuloj.

Tutmonda Kolektanto. Organo de E.-kolektantoj. Specimen-numero de: Tutmonda Kolektanto, Jablonné n. Orl., ČSR.

Für Weihnachten.

Im „Europäischer Verlag", Wien, erscheint ein passendes Weihnachtsgeschenk für alt und jung „Im Morgengrauen" von Hauptmann i. R. Emil Georg Spitzer. Subskriptionspreis S 4.— (Porto 30 Groschen), Ladenpreis nach Erscheinen S 6.—.

Zu jeder Gelegenheit passende Geschenke.
Esperanto-Hut von Ceschka, Wien.
Esperanto-Krawatte von Sphynx.

100 pikantaj panŝmirajoj
de Fr. Ruhm, kuirejestro.
Elgermanigis d-ro Sirk.
Ricevebla ĉe Ruhm-Verlag, Wien, VII., Museumstraße 3. Tel. B-32-2-89.
Prezo ŝ 1.20.

Eigentümer, Herausgeber und verantwortlicher Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer", Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.